

3<sup>a</sup> JARO.

OCEANO

N<sup>ro</sup> 7

# TRA LA MONDO.

• TUTMONDA • ILUSTRATA • REVUO • ESPERANTISTA •

JANUARO

1907.

AFRIKO.

AMERIKO.

## ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

**DIVERSAĴOJ**: La Malapero de la Usonaj Arbaroj, de *C. E. Randall* (UNUIGITAJ ŜTATOJ DE AMERIKO).

**TEATRO**: Kaprico, de *Alfred de Musset*, tradukita de *J. Flourens* (FRANCUJO).

**FELIETONO**: La fratoj de Mowgli, el « la libro de la ĵunglo », de *Rudyard Kipling*, tradukita de *C. W. Oxenford* (ANGLUJO).

**ĈIULANDA LITERATURO**: La Metamorfozo, TURKA fabelo, esperantigita de *P. Oreškof* (BULGARUJO).

**VIRINA PAĜO**: La Modo, de *Roksano* (FRANCUJO).

**INFANA PAĜO**: Kruĉo-Palaceto, el la rusa lingvo tradukis *Romanov Frenkel* (SIBERUJO).

**SCIENCOJ**: La Aerveturado, de *P-ro Marcel Finot* (FRANCUJO).

**PRI ESPERANTO**: La « Delegacio » kaj Esperanto, de *Aŭg. Montrosier*. Kroniko, Bibliografio.

**MIKSAĴOJ**: Konkurso pri senparolaj bildoj.



Jara abono: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr. (1,80 Sm.).  
La abonoj komercas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landojne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Internaciaj **RESPOND-KUPONOJ** estas akceptataj kiel 25 cent (10 Sd.).

CAROLINE  
1907. OXENFORD, E.V.

« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Aŭgusto.


# ATENTU, Sinjorino

vi ekdikiĝas, kaj dikiĝi estas maljuniĝi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reiĝos svelta.

La flakono da 50 drageoj estas sendata afanke de la: **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de 10 fr. Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY**.

## ASP KANDELLANTERNOJ por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,  
Oportuna, Pura,  
Neestingebla  
en Ventego.  
Funkciadas bonege  
nur kiam oni uzas  
la por ĝi

### Konstruitajn ASP-Kandelojn

145.000 Lanternoj jam venditaj!

Kostas: 4 danajn kronojn, = Spes. 2,20

kun lenso 5 kronojn, = » 2,75

18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn = » 0,83

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague.  
DANUJO.

### ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

Sro G. RUTTER, 30, Red  
Lion Squar, LONDON.



## VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN

laŭ la 78<sup>a</sup> milo franca tradukis

EMILO GASSE

Mendebla ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilo Gasse,  
77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe  
liaj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto,  
Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj Sro  
Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

### TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	} ANONCOJ : (33 literoj)	Por unu anonco:	0 fr. 75 ĉiulinie.
		Por 3 anoncoj almenaŭ	0 fr. 60 —
		Por la tuta jaro	0 fr. 50 —
		REKLAMOJ (50 literoj) :	2 fr. 50 ĉiulinie.

Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 cm. kv.)

	1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco:	100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.	10 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ:	80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.	8 fr.
Por la tuta jaro:	50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.	5 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « Tra la Mondo », Meudon (S. & O.)  
France, antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino de l' monato.

#### NE KOMERCAJ ANONCETOJ.

1,25 fr. por 4 linioj enhavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉiu plua linio  
komencita kostas 0 fr. 25.

Pro la dislegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj mal-  
karaj estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj;  
pli ĝenerale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton por havigi  
rilatulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumentiĝi: ni rekomendas ankaŭ tiujn  
anoncetojn al la grupestroj dezirantaj interrilatiĝi kun fremdaj samideanaj  
grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn  
korespondantojn por perfektigi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondantoj, mendoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn  
aŭ prokrastojn. Oni ankaŭ abonon aŭ reabonon senpere pro la sama motivo.

Adreso: **Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O.), France.**

Urgaj sciigoj: **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato  
por la tuj elironta N<sup>o</sup>.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

## Vera Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de  
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France)

SENPAGAN TARIFON

MILKA  
VELMA  
NOISETTINE

## Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANĜI.



## ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista  
Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. —  
11 f50 la kesto da 2 boteloj  
Sen kosto pri transporto kaj  
impostoj.

ALLIANDE. — 4 f ĉiu botelo  
prenita en S<sup>t</sup> Etienne,  
impostoj kaj transporto pluaj

Generala Tenejo por  
Francujo kaj Fremdaj

J. B. Brunon-Chauvet  
S<sup>t</sup> Etienne (France)

### FERVOJOJ DE PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE.

Interkonsente kun la K<sup>io</sup> P.-L.-M. kaj la fervojoj de la itala Ŝtato  
la K<sup>io</sup> de la Litoj-Vagonoj ĵus decidis la kreon de nova luksa  
vagonaro, la « Roma-Firenza-Cannes-Ekspres ».

Tiu vagonaro, kies ĉiustacia nomo elvokas historian memoron, aŭ  
naturan belajon, kaj kiu, de Pise alflankiĝas la marbordon ĝis  
Cannes, laŭirante la bonodorajn randojn de la franca « Riviera »,  
post elĉerpo de la ĝuado de l' itala Riviera, havos grandan sukceson  
ĉe la turistoj.

La « Roma-Firenza-Cannes-Ekspres » estas ĉiutage de la 21<sup>a</sup> da  
januaro, ekmarŝa tago.

Servo de Aŭtomobiloj ĉe la Paris'a Lyon'a Stacidomo.

De la 16<sup>a</sup> de Decembro, la K<sup>io</sup> P.-L.-M. liveras al la vojaĝantoj  
laŭ peto kupeojn aŭ omnibusojn aŭtomobilajn.

La vojaĝantoj irantaj sur Paris povos, dum la aliro, antaŭmendi  
kupeon aŭ omnibuson por sia alveno, farante peton ĉe ia vetura  
stacidomo.

Tiuj deirantaj de Paris povos sendi sian peton, aŭ al la stacidomo  
de Paris P.-L.-M., aŭ al ia urba oficejo de la K<sup>io</sup>.



## Kruĉo-Palaceto

Esperanta alfaro laŭ rusa popola fabelo <sup>(1)</sup>

Veturis vilaĝano; li veturigis potojn kaj kruĉojn al la foiro. Dum la vojirado li perdis grandan kruĉon, kaj ne tion rimarkis.

Kuŝas kruĉo apud la vojo; preterflugas Muŝo kaj vidas: palaceto bonega por kio ajn vi volas; ĝi enrampetis en ĝin, kaj ekloĝis.

Alflugas Kulo:

«Palaco-palaceto, kiu loĝas en la palaco?»

— «Mi: Muŝo-Ĉiontuŝo; sed vi, kiu estas?»

— «Mi estas: Kulo-Zumulo.»

— «Venu kun mi loĝi.»

Vivas ili, kaj unu tagon, kaj du; kuras Museto, frap! frap! per la vosteto:

«Palaco-palaceto, kiu loĝas ĉi tie?»

— «Muŝo-Ĉiontuŝo kaj Kulo-Zumulo; sed vi, kiu estas?»

— «Mi estas: Muso-Nazokonuso.»

— «Loĝu kun ni!»

Ekvivis ili triope; tamen restas ankoraŭ spaco.

Alsaltas Rano:

«Palaco-palaceto, kiu loĝas ĉi tie?»

— «Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo kaj Muso-Nazokonuso; sed vi, kiu estas?»

— «Mi estas: Rano-Marĉano.»

— «Saltetu al ni — da spaco estos sufiĉe!»

Ekvivis ili kvarope; ili vivas, vivadas; kuras la Straba Leporeto:

«Palaco-palaceto, kiu en la palaco loĝas?»

— «Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso, Rano-Marĉano; sed vi, kiu estas?»

— «Mi estas: Leporo-Timkoro.»

— «Loĝu kun ni!»

Ekvivis ili kvinope; ili vivas, vivadas; alkuras al ili Vulpeto:

«Kiu, kiu estas en la palaco, aŭdigu vian voĉon?»

— «Muso-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso, Rano-Marĉano, Leporo-Timkoro; sed vi, kiu estas?»

— «Mi estas: Vulpo-Multkulpo.»

— «Loĝu kun ni!»

Enrampis ankaŭ la Vulpo en la palaceton. Ekvivis ili sesope; ili vivas, vivadas; iregas Lupo, ĉirkaŭrigardadas, voston subtiradas:

«Kiu, kiu estas en la palaco?»

— «Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso, Rano-Marĉano, Leporo-Timkoro, Vulpo-Multkulpo; sed vi, kiu estas?»

— «Mi estas: Lupo-Kruelokupo.»

— «Loĝu kun ni!»

Enrampegis ankaŭ la Lupo en la palacon. Ekvivis ili sepope; ili vivas, vivadas; almarŝegas Ursego-Grandpiedego; en la arbaro seka branĉaĵo kraketis, kaj krakas la pinoj kaj tremoloj.

Kaj sonas voĉego:

«Palaco, palaco, kiu en la palaco loĝas?»

— «Muŝo-Ĉiontuŝo, Kulo-Zumulo, Muso-Nazokonuso, Rano-Marĉano, Leporo-Timkoro, Vulpo-Multkulpo, Lupo-Kruelokupo sed vi, kiu estas?»

— «Estas mi: Marŝegulo — ĉiujn-vin-Dispremulo!»

Kaj la Urso sidigis sur la kruĉon; ekraketis la palaco, kaj ĝin dispremis la Malrekt piedulo kaj ĉiujn ĝiajn loĝantojn.



ESTAS MI: MARŜEGULO....

ROMANO FRENKEL.  
el Enisejsk (Siberujo)



(1) Ĉiuj epitetoj de la bestoj estas alfaritaj al Esperanto, por ke ili povu rimi kun la nomoj de bestoj. En la originalo

## Kaprico.

De ALFRED DE MUSSET. <sup>(1)</sup>

ŜAVINJI.

Eble ; por kio ĝi utilis al vi ?

MATILDO.

Tute egale ; mi ĝin petas de vi.

ŜAVINJI.

Ne por ĝin porti, mi supozas ? Mi volas scii, kion vi farus kun ĝi.

MATILDO.

Mi ĝin portus.

ŜAVINJI.

Kia ŝercaĵo ! Vi portus monsaketon faritan de S<sup>ino</sup> de Blenvilo ?

MATILDO.

Kial ne ? Vi ĝin portas ja.

ŜAVINJI.

Kia bela argumento ! Mi ne estas virino.

MATILDO.

Nu ! Se mi ne ĝin utiligos, mi ĝin ĵetos en la fajron.

ŜAVINJI.

Ha ! Ha ! fine vi estas do sincera. Nu ! tre sincere ankaŭ, mi ĝin konservos, se vi permesas.

MATILDO.

Tio estas via rajto certe ; sed mi konfesas, ke estas korŝirante por mi pensi, ke ĉiu scias, kiu ĝin faris por vi, kaj ke vi ĝin montros ĉie.

ŜAVINJI.

Ĝin montri ! Ĉu oni ne kredus, ke ĝi estas trofeo ! (2)

MATILDO.

Aŭskultu min, mi petas, kaj lasu vian manon en la miaj.

Ŝi kisas lin.

Ĉu vi min amas, Henriko ? Respondu.

ŜAVINJI.

Mi vin amas kaj vin aŭskultas.

MATILDO.

Mi ĵuras, ke mi ne estas ĵaluza ; sed se vi amike donos al mi tiun ĉi monujon, tutkore mi vin dankos. Interŝanĝeton mi proponas al vi, kaj mi kredas, almenaŭ mi esperas, ke vi ne opinios vin perdanta.

ŜAVINJI.

Klarigu vian interŝanĝon ; kio ĝi estas ?

MATILDO.

Tion mi tuj diros, se vi ĝin deziras ; sed se antaŭe

vi al mi donus la monsaketon, konfidante mian promeson, vi igus min tre feliĉa.

ŜAVINJI.

Al mi ne sufiĉas promeson, por doni ion.

MATILDO.

Ho ! Henriko, mi vin petas.

ŜAVINJI.

Ne.

MATILDO.

Nu ! genue mi cin petegas.

ŜAVINJI.

Leviĝu, Matildo, miavice mi vin petegas ; vi scias, ke mi ne amas tiujn ĉi farmanierojn. Mi ne povas toleri, ke oni sin humiligu, kaj en tiu ĉi momento tion mi komprenas malpli ol iam. Tio estas tro insisti pri infanaĵo ; se vi ĝin postulus serioze, mi ĵetus mem tiun monsaketon en la fajron, kaj interŝanĝo por tio al mi estus tute indiferenta. Nu ! Leviĝu kaj ni plu ne parolu pri tio. Adiaŭ ; ĝis hodiaŭ vespere ; mi revenos.

Li eliras.

SCENO V<sup>a</sup>.

MATILDO, sola.

Ĉar mi ne bruligis tiun monsaketon, mi do bruligos la alian.

Ŝi iras al sia skribotablo kaj el ĝi tiras la monsaketon, kiun ŝi faris.

Kompatindulineto, antaŭ ne longe mi cin kisis ; kaj ĉu ci memoras pri tio, kion al ci mi diris ? Ni alvenas tro malfrue, ci ĝin vidas. Li ne cin volas, kaj jam ne min volas.

Ŝi proksimiĝas al la kameno.

Kiel freneza oni estas, kiam oni formas revojn ! Neniam ili efektiviĝas. Kial tiu allogo, tiu nevenkbla ĉarmo, kiu igas nin karesi ideon ? Kial tiom da plezuro fordonante sin al ĝi, sekrete ĝin plenumante ? Kial ĉio tio ? Por plori poste. Kion do volas la senkompata sorto ? Kiaj antaŭzorgoj, kiaj preĝoj estas do necesaj, por ke la plej simpla, la plej eta espero sukcese plenumiĝu ? Vi ĝuste diris, via Grafa Moŝto, mi insistas pri infanaĵo, sed al mi estis agrable insisti pri ĝi ; kaj vi, tiel fiera aŭ tiel malfidela, estus malmulte oferdoninta cedante pri ĉi tiu infanaĵo. Ha ! Li plu ne min amas, li plu ne min amas. Li amas vin, S<sup>inon</sup> de Blenvilo !

Ŝi ploras.

Kuraĝe ! pri tio mi jam ne devas pensi. Mi ĵetu en la fajron tiun ĉi infanludilon, kiu ne sciis alveni ĝustatempe ; se hodiaŭ vespere mi estus ĝin doninta al li, eble morgaŭ li estus ĝin perdinta. Ha !

(1) Sekvo. Vidu la Decembran Numeron. — (2) Angle : troj hy. France : trophée. Germane : trophäe. Hisp. : trofeo. Lat. : trophæum.

sen ia dubo, tion li farus ! li lasus treniĝi mian monujon sur la tablo, mi ne scias kie, inter siaj forjetajoj, dum male la alia iros ĉien kun li, dum male, en la nuna momento, li ludante eligas ĝin fiere ; mi lin vidas elmetantan ĝin sur la tapiŝon, kaj tintigantan la ormonerojn, kiujn ĝi enhavas. Malfeliĉulino ! mi estas ĵaluza ; al mi mankis tio por malamigi min !

Ŝi estas tuj jetonta la monsaketon en la fajron kaj haltas.

Sed kion ci faris ? Kial cin detruis, malĝoja faritajo de miaj manoj ? Ci ne estas kulpa ; ci atendis, ci esperis ankaŭ ! Ciaj helaj koloroj ne paliĝis dum tiu korŝiranta interparolado ; al mi ci plaĉas, mi sentas, ke mi cin amas ; en tiu ĉi delikata retajo estas dekkvin tagoj de mia vivo ; ha ! ne, ne, la mano, kiu cin faris, ne cin mortigos ; mi volas cin konservi, mi volas cin fini ; kvazaŭ reliko (1) ci estos por mi ; mi cin portos sur mia koro ; bonon kaj malbonon samtempe ci faros al mi ; mian amon por li, lian forgeson, liajn kapricojn al mi ci rememorigos, kaj kiu scias ? kaŝite sur tia loko, eble li tien venos cin serĉi.

Ŝi sidiĝas kaj alligas la pendaĵeton, kiu mankas.

— —

## SCENO VI<sup>a</sup>.

MATILDO, SINJORINO DE LERI.

*Srino DE LERI*, malantaŭ la scenejo.

Iu nenie ! kion tio signifas ? ĉi tien oni eniras kiel en muelejon.

Ŝi malfermas la pordon, kaj krias ridante.

*Srino de Leri* !

Ŝi eniras, Matildo leviĝas.

Ree bonau vesperon, kara ; neniom da servisto en via hejmo, mi ĉien kuras, por iun trovi. Ha ! mi estas lacega !

Ŝi sidiĝas.

MATILDO.

Malembarasu vin de via felvesto.

*Srino DE LERI*.

Post momento ; mi estas malvarmegiĝinta. Ĉu al vi plaĉas tiu ĉi vulpofelto ? Oni diras, ke tio estas mustelo el Etiopio, mi ne scias kio ; *Srro de Leri* ĝin alportis al mi el Holandujo. Sincere, mi opinias ĝin malbela ; pro ĝentileco mi ĝin surmetos trifoje, kaj poste mi ĝin donos al Ursulo.

MATILDO.

Ĉambristino tion ne povas surmeti.

*Srino DE LERI*.

Tio estas vera ; el ĝi mi faros tapiŝeton.

MATILDO.

Nu ! ĉu tiu balo estis bela ?

*Srino DE LERI*.

Ha ! Dio mia, tiu balo ! sed mi ne venas de tie. Vi neniam kredos tion, kio fariĝis al mi.

MATILDO.

Vi do ne iris al ĝi ?

*Srino DE LERI*.

Jes ja, mi iris al ĝi, sed ne eniris en ĝin. Tio mortigas pro rido. Imagu veturilviciradon..... veturilviciradon.....

Ŝi ekridegas.

Ĉu tiuj aĵoj vin timigas ?

MATILDO.

Sed jes ; mi ne ŝatas la embarasojn de veturiloj.

*Srino DE LERI*.

Tio estas ĉagrena, kiam oni estas sola. Mi vane kriis al la veturigisto, ke li antaŭeniru, li ne moviĝis ; mi koleris ! mi sentis deziron altiĝi sur la sidejon ; al vi mi certigas, ke mi estus trairinta ilian veturilaron. Sed estas tiel malsprite, esti en tualetto malantaŭ malsekigita vitraĵo, ĉar krom tio, pluvas torente. Duonon da horo mi min amuzis vidante la preterpasantojn marŝantajn en ŝlimo, poste mi diris, ke oni returneniru. Jen mia balo. — Tiu ĉi fajro faras al mi plezuron ! mi sentas, ke mi renaskiĝas !

Ŝi demetas sian felveston. Matildo sonorigas, kaj eniras servisto.

MATILDO.

La teon.

La servisto eliras.

*Srino DE LERI*.

*Srro de Ŝavinji* do foriris ?

MATILDO.

Jes ; mi konjektas, ke li iras al tiu balo, kaj li estos pli obstina ol vi.

*Srino DE LERI*.

Mi kredas, ke li malmulte min amas, tion ĉi mi diras nur al vi.

MATILDO.

Vi eraras, mi vin certigas pri tio ; centfoje li diris al mi, ke laŭ lia juĝo vi estas unu el la plej beletaj virinoj en Parizo.

*Srino DE LERI*.

Vere ? Li estas tre ĝentila ; sed mi ĝin meritas, ĉar mi opinias lin tre belŝajna. Ĉu vi volas prunte doni pinglon al mi ?

MATILDO.

Vi havas da ili apud vi.

*Srino DE LERI*.

Tiu Palmiro (2) faras robojn, kiujn oni ne sentas sur siaj ŝultroj ; oni ĉiam kredas, ke ĉio falos Ĉu tiujn ĉi manikojn ŝi faris al vi ?

*Daŭrigota.*

*Tradukita de*

JOHANINO FLOURENS,

*H. M. de la E. Vagabonda Klubo.*

(1) *Angl.: relic. Fr.: relique. Germ.: reliquie. Hisp.: reliquia, Lat.: reliquia.* — (2) *Fama tiama kudristino.*



# DIVERSAJĜOJ



## La Malapero de la Usonaj Arbaroj.



TIO, KION ONI DEVAS SAVI... AŬ RESTARIGI.

Staru somere sur la pinto de unu el la montoj en nia ŝtato Washington kaj ĉirkaŭrigardu: Kial oni ne povas vidi la teron malsupre? Kio estas tiuj densaj nuboj malodorantaj? Fumo? Nekredeble! Sed, jes: oriente, okcidente, norde, sude, sin trovas amasegoj da fumo, kaj se vi sufiĉe altiĝas, vi vidas grandajn kolonojn da ĝi, suprenirantajn el la lokoj, kie laboris multe da homoj la paŝintan jaron.

Ĉu la hakistoj deziras ke la arbaroj brulu? Ho ne, tute ne. Kial do bruladoj okazas? Kiam ili dehakas la arbeĝojn, ne utilas la folioj kaj la branĉoj; kaj tiuj ĉi restas, kie ili falis. Pluvo tre malofte falas somere en tiu ĉi regiono; sekve de tio elsekiĝas la lignaj pecoj, kaj neevitebla estas la fajro, ĉar ĉiam trapasas lokomotivoj, kaj ĉasantoj fumas pipojn, ekbruligas fajrojn por kuiri, forĵetas alumetojn en la rubaĵon kaj jen, — miloj da noblaj arboj pereas, la fajro etendas sin ĝis multaj kilometroj, kaj multe da homoj bataladas senĉese dum multaj semajnoj, por estingi la monstran fajregon!

Se oni kolektus la rubaĵon, protektus la arbarojn kontraŭ la fajro, kaj permesus kreskadi la malgrandajn arbojn, la arbaroj konserviĝus por ĉiam, sed — la diablo prenu la estontecon! nur la tujan profiton ni postulas; kaj ĉu la arbaroj ne apartenas al ni? Profito! Ĉiam la profito! Por ĉiu arbo dehakita de la profitemuloj, la fajro prenas dudek, sed kiu prizorgas? Post ni la superakvego, eble; sed por ni la *profito!*

Ĉu ni nun ĝojas pro la malaperiĝo, kaj laŭdas la

Kiam la unuaj blankkrasuloj alvenis sur la nord-amerikan kontinenton, ili eltrovis, ke la tuta lando estas kovrita per densa kresko de la plej belaj arboj diversspecaj. Tiel dense staris la arboj, ke estis tre malfacile trapenetri, kaj dum la senĉesaj militoj kiuj sekvis, la indianoj, kiuj kompreneble posedis bonan konon pri la vojetoj, ofte sukcesis venki la alvenintojn, pro siaj rapidaj movadoj kaj koncentriĝoj en neatenditajn lokojn.

Por pretigi la teron agrikulture niaj prapatroj estis devigitaj forigi la arbojn, kaj la sola metodo estis per fajro. Granda batalado kontraŭ la arbaroj sekvis. Oni ne opiniis ilin valoraj, ĉar la arboj troviĝis ĉie, same kiel aero, kaj la homo senkompate dehakadis la plej belajn specojn sennombre, bruligis trunkojn, branĉojn kaj stumpojn (1). La ligno bone utilas por domoj, palisaroj kaj diversaj aliaj uzoj, sendube, sed sen tero oni ne povas kreskigi tritikon; kaj greno tre superis la arbojn, laŭ la prapatroj.

Ju pli kreskadis la nombro de la blankkrasuloj en Ameriko, des malpli multaj iĝis la arbaroj; kaj forigante ilin oni « mortigis du birdojn per unu ŝtono, » t. e., ne nur la arbaroj malaperis sed ankaŭ la ruĝhaŭtuloj, kiujn la blankaj homoj tiel fervore malamamis.

Pasis kelkaj centjaroj. Kie antaŭe kreskadis grandaj arbaroj, plenigitaj de belaj birdoj, graciaj cervoj, ursoj, akvoj, kun kelke da indianoj, nuntempe troviĝas grandegaj urboj, gigantaj fabrikejoj, multege da farmoj, kaj ĉie, ĉie homoj, — tiom da homoj, ke apenaŭ oni povas ilin kalkuli.

Kie estas la arbaroj, la grandaj, belegaj, dolĉe murmurantaj, bonodorantaj arbaroj de niaj prapatroj?

Demandu la multajn segmuelejojn, la fajron, la komercistojn!

Demandu en nia ŝtato Washington kaj ĉirkaŭrigardu:



LOKA DETRUADO.

(1) Germ.: Stummel; Fr.: Tronçon, fragment; Esp.: Lignopeco.



GRANDA SEGMELEJO EN WASHINGTONA ŜTATO,  
kaj ŝipoj atendantaj.

aliajn lokojn taŭgajn, tiom da arboj, kiom cirkonstancoj ebligas.

Usonanoj antaŭ ne longe eltrovis, ke la detruo de la arbaroj estas fakto jam preskaŭ farita: ke, anstataŭ la beno atendita, tiu fakto estas malbeno kaj gravega minaco al la tuta nacio. Pro tio ili nun febre penas malfari la laboron de la patroj, kaj denove kovri la landon per aliaj arbaroj.

Sed, bedaŭrinde, tio ne estas facila; la pli granda parto el la tero apartenas al privataj individuoj, kiuj aŭ indiferentas aŭ ne havas rimedojn. Kreskigi arbarojn postulas multajn jarojn, kaj kiel vivadi intertempe? Kial konservi arbarojn, kiam la prezo de lignaĵo estas alta kaj ĉiam altiĝas?

Ĉiam la grandegaj segmuelejoj laŭte krias « pli da arboj! »; ĉiam multaj paperfabrikejoj postulas novajn milionojn, kaj por ili ne estas grava la grandeco. Miloj da grandaj ĉiutagaj ĵurnaloj devas havi paperon, kaj senĉese daŭras la detruado.

Rimarku ke la dimanĉa eldono de nur unu el la New York'aj ĵurnaloj, la « Journal », eluzas la tutan produkton da arboj sur 450 hektaroj! Ĉu estas mirige, ke la arbaroj tiel rapide malaperas?

Konstante altiĝas la prezo de la lignaĵo, papero kaj meblaro, tiel ke substituaj ŝtofoj devas esti eltrovataj, ĉar nuntempe tiel alte kiel mahagonon! oni valorigas la blankan pinon, kiu, en la juneco de la verkinto, estis unu el la plej malkaraj, kvankam utilaj specoj.

Por la domkonstruado usona oni pli kaj pli uzas ŝtalon kaj betonon; por meblaro, feron kaj ŝtonon; kaj por papero, eksperimentoj ĉiam okazas pri diversaj plantaĵoj, ekzemple kotonaj, maizaj trunketaj, k. a.

Kompreneble la restantaj arbaroj, almenaŭ tiuj, kiuj ne apartenas al nacio, suferas pli kaj pli. Nur en la ekstrem-sudaj kaj nordokcidentaj ŝtatoj, ankoraŭ troviĝas arbaroj; kaj, laŭ raporto de la regnestro, la nuna eluzo de lignaĵoj estas kvaroble pli granda, ol la kreskado!

Sed ne nur la detruado de la arbaroj estas alarmiga; pro la forigo de la arboj, la riveroj en la tuta lando konstante minacas la apudestantojn, kaj ĉiujare detruas urbojn, pontojn, ŝipojn, farmojn, brutojn, homojn kaj ĉion ajn, laŭ la fluejoj.

Kontraŭe, post la elfluo de la vintraj neĝoj fluidiĝintaj, la riveroj preskaŭ sekigiĝas, tiom ke la vaporboatoj ne povas funkcii. En multaj partoj la klimato jam tiom ŝanĝiĝis, pro la foresto de arbaroj, ke la farmado estas tre riska, kaj farmistoj devas pli kaj pli sin turni al la irigaciaj sistemoj. Sed, ĉar oni ne povas ĉiam fidi al la riveroj mem, tiu plano ne ĉiam sukcesas.

Oni ne povas dubi, vidinte la rezultatojn de la senarbarigo de la tuta kontinento, ke la sola espero de la Usonanoj estas, restarigi kiel eble plej baldaŭ grandegajn arbarojn, ĉie, kie tio estas ebla, samtempe konservi la restantajn laŭeble, kaj ĉiamaniere eviti la malbonon devenintan de la laborado de la prapatroj.

Jam kelkaj paŝoj al tiu celo fariĝis; oni apartigis kiel « forest reserves » (arbaraj rezervaĵoj) grandajn areojn sur kelkaj partoj de la lando, kaj tie oni malpermesas la dehakon de la arboj iakaŭze; ankaŭ tiuj rezervaĵoj estas ĉiam zorge gardataj de sufiĉaj rajdantoj, por eviti la fajron. Tiucelen la rubaĵo estas amaskolektita malproksime. Telefonoj troviĝas ĉie, por ke la gardistoj povu haviĝi helpon laŭnecese.


Ĉar sur la pli granda parto de la rezervaĵoj nun ne ekzistas arbaroj, oni konservas aron da lertuloj konstante laborantaj pri la kolektado de semoj, plantado de milionoj da junaj arboj, provoj pri la taŭgeco de teroj por diversaj specoj de arbo, kaj malpermeso al la brutoj, kaj aparte al la ŝafoj, eniri la rezervaĵojn, k. c.

La fakto de la arbaroj ĉe Washington sin okupas ankaŭ pri la edukado de la popolo rilate al la neceseco, planti tiom da arboj, kiom oni povas, sur privatajn kampojn, donas senpagan sciigon pri la plej bonaj arbspecoj por ia ajn tero, kaj penas konvinki la posedantojn de la restantaj arbaroj, ke la sola metodo, per kiu oni povas uzi kaj samtempe ne eluzi la posed-

agemecon de la de - longe - mortintoj kontraŭ la ĉieaj belkreskaĵoj?

Ho! ne, tute ne; kontraŭe, la tuta nacio, escepte la suprenomitoj, malbenas la malsaĝecon de la sencerbuoj, kiuj tiel forte laboradis por detruu unu el la plej valoraj donacoj al la homaro — la belegajn arbarojn!

Anstataŭ konstantaj penoj por detruu kiel eble plej baldaŭ la arbarojn, kiuj ankoraŭ restas, nia regnestro baraktas kun la problemoj, kiel restarigi sur la montojn, sur la landpartojn kie terkulturo ne estas ebla, kaj sur ĉiujn



ŜARĜO DE GRANDAJ TRABOJ  
sur ŝipojn apud Seattle, por Anglujo.

aĵojn, estas dehaki nur la grandajn arbojn, lasi la malgrandajn kreskadi — kaj zorge eviti fajron — ,laŭ la planoj de la rezervgardistoj mem.

Kompreneble kontraŭ la homoj kaj fajro la arbaroj antaŭe ne havis ian ŝancon daŭri; sed de nun la amikoj al la movado esperas, plibonigi la kondiĉojn de la kompatindaj arbaroj. Estos longa, multekosta, malfacila tasko, tro granda por ia kompanio aŭ eĉ solaj ŝtatoj. Tamen la ĝenerala regnestraro ĉe Washington certe havas la necesan potencon, kaj ŝajnas posedi la inklinton, energie antaŭenpuŝi la replenigadon de nia belega lando per arboj, — ne

kiel antaŭe en densaj amasoj sovaĝaj, — sed en kaj ĉirkaŭ ĉiuj urboj, urbetoj, vilaĝoj, laŭ la flankoj de ĉiuj vojoj, kampoj kaj fakte ĉie, kie la tero ne estas aliuze necesa.

Se la nuna plano efektiviĝos, kaj pri tio ŝajne ne ekzistas iaj duboj, post kvindek jaroj ne nur troviĝos du cent milionoj da loĝantoj en Usono, sed ankaŭ senlimaj milionoj da grandaj, belegaj frukt- kaj nukspportantaj arboj, bonegaj amikoj al la homaro, kaj tiutempe la plej ŝataj.

CHARLES E. RANDALL.  
Seattle, Wash., U. S. A.



## INTERNACIAJ SPORTAJ FESTOJ EN CHAMONIX.




FRANCAJ ALPSOLDATOJ.

La 3<sup>an</sup> de Januaro komenciĝis en Chamonix granda vintra sporta festo organizita de la franca alpa klubo. Multe da sportamantoj respondis ĝian alvokon, kaj de la antaŭtago la fervojo alkondukis al la pitoreska urbeto, kun la grupoj de la parizaj kaj provincaj sekcioj, multajn diversnaciajn fremdulojn. Inter tiuj ĉi distingigis norvegaj, svisaj kaj hispanaj oficiroj.

La ĉefa allogaĵo de tiuj festoj estis la skikonkursoj; dum la militistaj kuradoj oni multe rimarkis, kondukatajn de iliaj estroj, la grupojn el svisaj kaj norvegaj soldatoj, kies mirinda lerteco estis ŝatinda ekzemplo por iliaj francaj kolegoj, novaj adeptoj de tiu sporto.

Ankaŭ tre sukcesaj estis la salto duope kaj triope de la norvegaj soldatoj; samlandaj amatoroj atingis salti ĝis 30<sup>m</sup>.

A. PLOUSSU (Grenoble).



## La metamorfozo. Turka Fabelo,

Husein-Aga (kunfrato Ĥusein) estis tre maltrankvila. Li estis ŝparinta grandan sumon da mono, por povi iri al la adorado en Mekon. Io maltrankviligis lin, nome ke, kiam li estis farinta atente la kalkulon pri la elspezoj por tiu longa vojaĝado, restis superflua kelkaj centoj da piastroj. Kion li faros el ili?

Vere li povus disdoni ilin al la malriĉuloj, sed kiam li revenos, ĉu tiam ili ne estos utilaj por ankoraŭ pli laŭdinda afero?

Post longa konsiderado, li decidis, ke ne estas la volo de Allah (Dio), ke li unufoje almozon tiun ĉi monon. Aliflanke, li sentas sin konvinkita, ke li ne volas doni ĝin al sia frato, por gardi, ĉar dum lia adorado, tiu ĉi povus elspezi la monon por bonfaranta afero. Post nelonga pripenso li memoris pri sia najbaro, bonanima kaj saĝa Hebreo, kaj decidis

doni sian ŝparitan monon al tiu ĉi viro, al kiu Dio montras favoron, ĉar lia bieno estas multobligita. Pripensinte pli bone, li decidis, por ne konduki sian najbaron en tenton, meti en la fundon de poto saketon kun la superflua mono, kaj plenigi la poton per olivoj.

Poste li portis la poton ĉe sian najbaron, petante, ke li gardu ĝin, ĝis li revenos. Ben-Mojseio, kompreneble, konsentis, kaj Ĥusein-Aga veturis kontenta al Meko.

Kiam li revenis de l' sankta tero, nun Ĥadĵia (1), Ĥusein-Aga iris ĉe Ben-Mojseion, kaj ekpetis la poton kun la olivoj, alportante samtempe al li kvanton da Ĥemenaj ŝtonetoj, kiel dankecan donacon ĉar li gardis lian poton kun olivoj, dirante al li ke la olivoj estas treege bongustaj. Ben-Mojseio dankis

(1) Kiu iris sanktan teron Mekon aŭ Jerusalemon, liu estas nomata Ĥadĵia (adorinto).



lin kaj Ĥadĵi-Ĥusein-Aga reiris hejmen treege kontenta, kunportante la poton.

Okazis, ke kiam Ĥusein-Aga forestis, ĉe Ben-Mojseion alvenis iaj bonegaj gastoj; kiel estas la loka kutimo, li regalas ilin per brando. Bedaŭrinde, tamen, li havis nenian manĝeton por aldoni al la brando. Ben-Mojseio rememorigis pri la pota, kaj eliris kelke da olivoj, dirante al si, ke la olivoj ne estas maloftaĵo: Ĥusein-Aga ne konos la diferencan, se li ŝanĝus ilin por aliaj.

La olivoj troviĝis bonegaj; tia! Ben-Mojseio de tempo al tempo per ili regaladis siajn gastojn.

Grandega estis lia miro, kiam fine anstataŭ olivoj, li eliris saketon plenan je ora mono. Ben-Mojseio ne povis kompreni tiun ĉi fenomenon, sed li prenis la monon, replenis la poton je olivoj kaj silentis.

Reveninte hejmen la malriĉa Ĥusein-Aga tre miris, kiam li vidis, ke lia pota enhavas nur olivojn.

Vane li demandis pri tio Ben-Mojseion.

« Amiko, — respondis Ben-Mojseio, — vi donis al mi la poton dirante, ke ĝi enhavas olivojn. Mi kredis vin, kaj gardadis vian poton. Nun vi diras al mi, ke vi metis monon, sed ĉu tiu ĉi pota ne estas tiu, kiun vi donis al mi? Se ĝi enhavis ormonon, kiel vi diras, kaj nun ne enhavas ĝin, tio, kion mi povas diri, estas: ke la pli forta venkas la pli malfortan, kaj ke, en tiu ĉi okazo, la oro aliformiĝis aŭ en olivojn aŭ en oleon. Kiel mi povas helpi al vi? La poton, kiun vi donis al mi, mi redonis al vi. »

Ĥadĵi-Ĥusein-Aga konsentis pri tio, kaj plene konfesis, ke li ne povas kulpigi la Hebreon; kaj dirante « ĉok-ŝej! » (mirinda afero) li revenis hejmen.

Tiun nokton, Ĥusein juris dum siaj preĝoj, ke li trovos sian monon ia ajn maniere, kaj kiom ajn tio ĉi kostos al li.

Dum siaj junaj jaroj Ĥadĵi Ĥusein fabrikadis pipojn, kaj faris multajn el ili treege estetikajn.

Se vi pasus sur la poteja strato de la Tofaneto en Konstantinopolo, vi vidus liajn ellaborojn. Kompreneble tio nutris lin dum multaj jaroj, kaj nun ĝi estis utilonta al li, por repreni sian monon.

Ĥadĵi Ĥusein ĉiutage renkontiĝis kun Ben-Mojseio, sed aludis neniel pri la mono, kaj la filoj de Ĥusein ĉiam amike rilatis kun la ununura filo, dek-jara knabo, de Ben-Mojseio.

La tempo fluadis, kaj Ben-Mojseio tute forgesis la poton, la olivojn kaj la ormonerojn. Ĥadĵi Ĥusein, tamen, ne forgesis tion; li komencis labori. Antaŭe li faris figuraĵon similan al Ben-Mojseio. Kiam li finis sian modelon, kiel li deziris, li vestis ĝin per vesto precize simila al tiu, kiun portadas kutime la Hebreo. Tiam li aĉetis simion. Tiun ĉi simion li gardis en kaĝo kontraŭ la figuraĵo de Ben-Mojseio. Ordinare li metis, du fojojn ĉiutage, la manĝaĵon por la simio sur la ŝultrojn de la kvazaŭa Hebreo; kaj kiam Ĥusein malfermis la kaĝon kaj diris « Babai git » (iru al patro via), per unu salto la simio salt-

is sur la ŝultrojn de l' Hebreo, kaj foriĝis de tie, nur kiam ĝi estis satiginta sian malsaton.

Samtempe Ĥadĵi Ĥusein kaj Ben-Mojseio estis pli bonaj amikoj ol iam, ankaŭ iliaj infanoj pli amikiĝis konstante. Ian tagon Ĥusein prenis la filon de Ben-Mojseio hejmen, kaj diris al li, ke li estos lia gasto dum unu semajno; pro kio la knabo ĝojegis. Post kelke da tempo Ben-Mojseio iris ĉe Ĥusein por ekscii, kial lia filo ne revenas ĉiumatene.

« Ho, ve! Amiko! diris al li Ĥusein, granda malfeliĉo atingis vin! Via filo, ve! aliformiĝis en simion, en simion malbonegan! tiel malbonegan, ke mi estis devigata meti ĝin en kaĝon; venu kaj vidu vi mem. »

Tuj Ben-Mojseio eniris la ĉambron, kie estis enfermita la simio, kiu, kiam ĝi ekvidis lin, alvokis per forta krio, kvazaŭ ĝi ne estis manĝinta de du tagoj. La malfeliĉa Ben-Mojseio restis miregigita. Ĥadĵi petis lin, ke li prenu sian infanon, sed li returnis hejmen, ne dirante unu vorton.

La morgaŭan tagon Ĥusein estis alvokata en la juĝejon. La juĝistoj elaŝkultinte la du partiojn, ordonis, ke Ĥusein redonu tuj la infanon.

Ĥadĵi Ĥusein ĵuris, ke li ne povas plenumi tiun ĉi ordonon, kaj por konvinki la juĝistojn, li proponis alvenigi la simion en la juĝejon kune kun la kaĝo, kaj se volos Dio, ili vidos, ke la infano de l' Hebreo estas aliformiĝinta en simion. La juĝistoj fine pri tio konsentis kaj la simio estis alportita. Ĥadĵi Ĥusein zorgis, ke oni metu la kaĝon kontraŭ Ben-Mojseio. Tuj kiam la simio ekrigardis tiun ĉi, ĝi ekpuŝis tian krion, ke la juĝistoj diris « ĉok-ŝej » (mirinda afero); Ĥusein-Aga tiam malfermis la pordeton de la kaĝo, kaj diris turke « babai git » (iru al via patro), la simio per unu salto momente ĉirkaŭprenis Ben-Mojseion, klinante la kapon por serĉi manĝaĵon de unu ŝultro al la alia. La juĝistoj restis miregigitaj, kaj proklamis, ke en tia okazo, ili ne estas kompetentaj, por konkludi la aferon.

Ben-Mojseio protestadis, dirante, ke tia metamorfozo estas kontraŭ la naturaj leĝoj; kontraŭ tio Ĥadĵi Ĥusein rakontis al la juĝistoj alian similan okazon, nome ke kelke da oraj moneroj estis aliformiĝintaj en olivojn, kaj invitis Ben-Mojseion atesti la verecon de lia diro. La juĝistoj ne kuraĝinte elparoli ian juĝon, ree proklamis, ke tia okazo ne povas submetiĝi sub la leĝoj agantaj kaj ke, nesciantaj pri ia alia simila okazo, ili konsideras sin kiel nekompetentaj.

Elirante el la juĝejo, Ĥadĵi Ĥusein diris al Ben-Mojseio, ke li ree povus havi plezuron kaj feliĉon en tiu ĉi mondo, se li povus aliformigi la olivojn en orajn monerojn.

Ĝstus superflue, se ni aldonus, ke Ben-Mojseio redonis duoble la monon al Ĥadĵi Ĥusein, kaj la ido de Ben-Mojseio revenis hejmen, neniel pli malbona ol li estis antaŭe.

Esperantigis

G. P. OREŝKOF (Bulgarujo).





LA EKZERCEJO DE LA EKSPEDICIO WELLMAN ĈE SPITZBERG.

En rodo, la Fritjof.

## La Aerveturado en 1907.

Neniam oni okupis sin kaj oni parolis tiom pri aerveturado, kiom dum tiuj lastaj monatoj: aerveturado estas nuntempaĵo pri kiu *Tra la Mondo* jam parolis (II, 132) sed la rezultatoj atingitaj en 1907 estas tiel gravaj, ke estos interese ilin rapide rememorigi.

Ne parolante pri la kunvenoj de diversaj societoj en ĝiaj kampoj, oni povas memorigi la konkursojn de aerostatoj okazintaj en Parizo, Bruselo, kaj S<sup>ta</sup> Ludoviko (U. S. A.). La unua, kiu enhavis 20 konkurantojn, estis malhelpita de malbona vetero, kaj oni devis trovi la venkinton, S<sup>ro</sup>n Delobel, sur maro, apud Ostendo. La konkurso de Bruselo, la 28<sup>an</sup> de sept., havis pli bonan sukceson: 33 aerostatoj je ĉiuj ampleksoj, de 250 ĝis 2200 m<sup>3</sup>, tie ĉeestis; la lasta, *Pommeru*, direktita de S<sup>ro</sup> Erbslöh, de Aero Club germana, gajnis la premion, aerirante de Bruselo ĝis Bayonne, 950 kilometrojn.

La granda ĉiujara kurado, Pokalo Gordon-Bennett, okazis tiun ĉi jaron en Ameriko, ĉar la gajnanto en 1906 estis Sinjoro Jeŭtenanto amerika Lahm. Ses nacioj konkuradis, kaj la Pokalo revenis en Eŭropon: la gajnanto estis ankoraŭ *Pommeru*, trairinte 1500 Km.; la dua estis franca, Sinjoro Leblanc, kun prokrasto de nur 1600 m.

Tamen kelkaj malfeliĉoj malĝojigis tiun jaron, dum kiu mortis kelkaj serĉistoj. La lasta estas pere de aerostato *Aquilon*, elirinta el Bordeaux la 12<sup>an</sup> de okt., kaj sendube perdiginta en Atlantiko. Oceano estas tomo de multaj aerveturantoj, kiuj tro multe fidis sin al sia ŝipo, kaj mortas penante plialtigi la rekordojn de siaj antaŭuloj.


Je la vidpunkto scienca, aerostatojn oni uzis por studo de kondiĉoj meteorologiaj de altaj regionoj de atmosfero, kien estas neeble sendi homojn. Unu el la lastaj aerostatoj, sendita de observejo de Trappes, atingis la eksterordinaran altecon de 20.300 m., kaj alportis treege interesan diagramon, pli gravan ol tiuj de S<sup>ro</sup> Hermite.

### La aerostatoj direkteblaj. — En Francujo.

Sed precipe en la fako de la direktebla aerveturado fariĝis la plej rimarkindaj progresoj dum tiu ĉi jaro. En Francujo, dum la direktebla *Patrie* rekomencis siajn preskaŭ ĉiutagajn vojaĝojn por instruado de la militaj aerŝipistoj, la *Ville de Paris* faris sinsekvajn promenadojn, kiuj pruvis siajn gravajn kapablojn de rapideco kaj de direktebleco. Tiu mirinda aerostato, konstruita de inĝeniero Kapferer, estas donita al la ministro de la militaĵoj, de sia posedanto, S<sup>ro</sup> Deutsch de la Meurthe. Ĝi posedas antaŭan helikon, ligitan per du artikoj kun motoro de 70 HP; la korbego estas tenata de armita trabo longa je 42 metroj. Por kompari la ampleksojn de la ŝipoj de diversaj nacioj, jen estas la amplekso de ĉiuj ŝipoj francaj ĝis nun konstruitaj.

*Lebauty 1* (1902) 2500 m<sup>3</sup>, rapideco 40 Km. ĉiuhore, detruita per malfeliĉaĵo en 1903; *Lebauty 2* (1904) 2950 m<sup>3</sup>, rapideco 42 Km.; ĝi povis resti kelkajn horojn en aero kun tri homoj; *Patrie* (1906) 3150 m<sup>3</sup>, rapideco 45 Km., trairis 400 Km. dum 10 horoj kun 4 personoj en 1906 kaj multege pli en 1907; post multaj promenadoj ĉirkaŭ Parizo, ĝi povis iri senpere al sia ejo ĝis la landlimo, en Verdun, kie ĝi loĝis ĝis sia forflugo: tiu mirinda vojaĝo, longa je 250 Km., daŭris 7 horojn; elirinta el Chalais-Meudon, la 23<sup>an</sup> de nov., je 8 h. 45 matene, ĝi alvenis en Verdun je 3 h. 20, elspezinte nur 140 litrojn da petrolo.

Malfeliĉe, mallonga estis ĝia vivo kaj malgaja ĝia morto. Post du vojaĝoj ĉirkaŭ Verdun, riparado de ĝia magneto estis ĝin haltiginta, kiam terura ventego fortiris ĝin: malgraŭ la penadoj senesperaj de ducent soldatoj, kiuj retenis ĝin, la vento venkis, kaj la aerostato forflugis. Tamen oni iomete esperis: eble ventego elĵetus ĝin sur francan teron, kaj la malfeliĉo estus ma'pli granda. Sed ĉiu minuto forpelis tiun esperon: oni sci' ĝis, iom post iom, ke ĝi estis sendita al Manso



LA DIREKTEBLA « VILLE DE PARIS ».

(brita kanalo) kaj al Anglujo; oni estis ĝin vidinta apud Cardiff, Belfast, fine oni trovis helikon kaj baron sur kampo apud Ballydavey. Malplipezigitaj pro tiu perdo, ĝi estis forfluginta al Oceano, en kiu fine ĝi sendube enabismigis.

*Ville de Paris* 3000 m<sup>3</sup>; dum unuaj eksperimentoj, ĝi povis flugi dum 35 minutoj je rapideco de 40 km., kontraŭ vento de 4<sup>m</sup>50, kaj, en aliaj vojaĝoj, de 6 kaj 7 m. ĉiusekunde. Ĉar la sukceso kuraĝigas la serĉantojn, S<sup>ro</sup> Deutsch intencis baldaŭ trairi la Manŝon kaj iri el Parizo ĝis Aldershot, ejo de la brita ŝipo, dum 6 horoj, promenadi super Londono, kaj reveni hejmen Nun, la aerostato, apartenanta al la franca ŝtato, ne povas permesi al si tian fantaziaĵon. La 15<sup>an</sup> de Januaro, malgraŭ malfavoraj atmosferaj cirkonstancoj, ĝi iris sukcese de Chalais-Meudon ĝis Verdun, ĝia nuna restejo.

#### En Germanujo.

La aliaj landoj, samtempe antaŭemaj, sukcesis konstrui kelkajn bonegajn aerostatojn direkteblajn. En Germanujo, tiu de majoro Gross, *Motorluftschiff 1*, iom simila al la ŝipoj francaj, estas tamen nur provaĵo: ĝia malforta motoro estas nur forta de 30-35 HP, kun 4 cilindroj; la konstruado de la gasujo estis senzorge farita, kaj, anstataŭ ol esti cilindro pinta al ĝiaj ekstremajoj, ĝi ŝajnas nur grandega kolbaso. Kiam oni estis konstruinta ĝin, oni rimarkis, ke ĝia suprenira forto estas tro malforta, kaj ĝia amplekso estis pligrandigata de 1400 ĝis 1800 m<sup>3</sup>. La plej granda novaĵo konsistas el du helikoj je aluminio, longaj je 2<sup>m</sup>50 kaj lokitaj ĵus malsupre, dekstre kaj maldekstre de la ŝipo, kaj movitaj de pulio turnanta kun rapideco de 800 turnoj ĉiuminute. Ĝi povas flugi kun rapideco de 20 Km. kontraŭ vento de 4-5 metroj. Fine, malgraŭ ĝia pezo kaj amplekso, ĝi estas facile movebla kaj oni povas ĝin pleniĝi je gaso post 4 horoj; kun ĝiaj motoroj kaj aparatoj, oni povas loki ĝin sur unu veturilo, tio estas tre grava kaj praktika je la vidpunkto milita.

Samtempe kun tiuj eksperimentoj, kaj preskaŭ en sama aerostata kampo, majoro von Perceval eksperimentis alian aerostaton. Jam en 1905 li estis konstruinta ŝipon, kun aldona aerostateto, kies nur kliniĝo sufiĉas por ebligi movon de supren- aŭ malsupreniro; ĝi tamen estis malmulte praktika. La *Von Perceval*, 1907 (3000 m<sup>3</sup>), konstruita de la sama societo kiel tiu de S<sup>ro</sup> Gross, kaj sendube utiligota de germana militistaro, estas pli longa, movita de 90 HP, posedas helikon kun 4 flugiloj silkaj, kiuj, per ago de forcentriga forto, malfaldiĝas kaj etendiĝas, kiam la motoro ilin movigas. Je la fino de septembro, ĝi faris vojaĝon unuhoran kontraŭ vento de 11 metroj.

Fine mi devas paroli pri la sukcesaj provoj de S<sup>ro</sup> Zeppelin. La unuaj malsukcesaĵoj de 1903 super la lago de Konstanco, kuraĝigitaj de imperiestro Wilhelm II, devigis ke Grafo Zeppelin konstruu novan aparaton similan al la unuaj, kaj kiun la germana registraro aĉetis en 1906. La *Zeppelin 1* estas grandegulo: longa je 128 m., diametro je 12 m., voluma je 11.300 m<sup>3</sup>, ĝi estas trifoje pli ampleksa, ol la plej granda el la aliaj. Ĝia karakterizaĵo estas jena: ĝia volumo estas konstanta, ĉar gasujo estas malmoligita de trabaĵaro aluminio; pro tio la kompensa baloneto ne estas necesa. Tiu trabaĵaro konsistas el linioj meridianaj kunligitaj kun 15 cikloj transversaj provizitaj per radioj samaj, kiel tiuj de biciklo. En ĉiun el tiuj 16 fakoj oni metas baloneton cilindran, escepte en la ekstremajn, ĉar l' aerostato estas cilindro finita per konusoj. Kotona kovrilo kovras tiujn balonetojn, kiuj komunikas inter si, por ke la premo estu sama en ĉiu el ili. Malsupre de la ŝipo estas trabo armita, longa je 56 metroj, tenanta du korbojn. Estas 2 motoroj, ĉiu je 85 HP (do kune 170 HP) agantaj sur heliko turniĝanta je 850 turnoj. Ĝi povas sublevi 9 personojn kaj 2500 Kg.; ĝi trairis 110 Km. dum 2 h. 17; tiu vojaĝo necesigis nur elspezon de 180 Kg. da balasto.


#### En Anglujo.

En Anglujo, kolonelo Trempler konstruis la *Nulli Secundus* (2400 m<sup>3</sup>), longa je 34 metroj, kiun kondukis majoro Cody. Ĝi konsistis el gasujo cilindra, randa ĉe la ekstremajoj, el baŭdruco; transverse estis aldonitaj 4 tolaĵaj banderoloj, al kiuj oni ligis fadenojn el fero tenantajn metalan trabaĵaron lokitan sub la gasujo. Malantaŭe estis direktilo heksagona je tolaĵo, fiksitaj sur bambuo, kaj horizontale, sur du flankoj, du flugiloj por reguligi la supren- aŭ malsupreniron; fine malsupre estas korbego ŝipoforma kun motoro de 50 HP aganta senpere sur aluminian helikon. Dum ĝia unua vojaĝo ĝi trairis 7 Km. laŭ rapideco de 24 Km. kun vento de 4<sup>m</sup>50. Malfeliĉe, volinte ke la Londonanoj admiru sian aparaton, ĝi eliris el ĝia ejo, alvenis ĝis Kristala Palaco, sed fortega vento devigis, ke oni malplenigu ĝin je gaso; la aparato estis tute detruita, kiel antaŭe la *Lebaudy*; oni ĝin rekonstruos.

#### En Italujo. — En Ameriko.

Oni estis sciiginta en Italujo, ke nova aerostato estas en preparado, sed oni ne plu parolis pri ĝi. Tamen en 1905 grafo da Schio konstruis la *Itala*, malperfektan aparaton, kiu ne povis longatempe resti en aero.

En Ameriko, oni ne ankoraŭ konstruis taŭgan aparaton. La 21<sup>an</sup> de oktobro 1907 estis organizita en S<sup>ta</sup> Ludoviko konkurso de aerostatoj direkteblaj. Nur 3 aerostatoj konkuris; ili estas malgrandaj, similaj al la unuaj de Santos Dumons, tro simplaj kaj malmulte elegantaj. Trikilometra vojaĝo, iro kaj reiro, estis plenumata dum 1/4 da horo de Lincoln Beachy, de Toledo (Ohio). Malgraŭ la malboneco de la rezultato, la Amerikanoj povas esti fieraj, tial ke ili organizis la unuan konkurson de direkteblaj: tio estas almenaŭ *rekordo*.



LA DIREKTEBLA « PATRIE ».

## Esplorado Wellmann al la Poluso.

Fine oni devas saluti kuraĝeman gazetiston amerikan, Walter Wellmann, kiun ne malkuraĝigis la malsukcesoj de André. De du jaroj li preparas esplorado al Norda Poluso: « Mi pensas, li diris, ke post tri jaroj mi atingos la Poluson per aerostato. Mi havos nenian ŝancon la unuan jaron (1906); mi esperas sukcesi la duan (1907), sed la eraroj estas eble tiel grandaj, ke mi devos trian jaron rekomenci. Mi havos 37 ŝancojn por reveni, 62 por atingi la Poluson, ĉiujn por tie resti. »

Li do konstruigis direkteblan ŝipon *America* (7400 m<sup>3</sup>), longan je 55 m., diametran je 16; motoro de 60 HP agas sur du metalajn helikojn turnantajn je 380 turno, lokitajn duflanke de korboj; tiuj ĉi pezas 800 Kg. kaj povas enteni 10 personojn, 12 hundojn, 400 litrojn da petrolo kaj nutraĵojn por dek monatoj; Wellmann alportis ĉion sur insulon de Danoj, en Spitzberg.

Post multaj tagoj da vento kaj fulmotondro, *America* estis fortirita el ĝia ujo la 2<sup>an</sup> de sept., dum vento N.E.; la esplorantoj estis senditaj de forta vento al granda monto, kiun la motoro sukcesis eviti, kaj direktis sin al la Poluso; sed neĝego falis subite tiel dika, ke ili nenion plu vidis, kaj fine ili devis reveni malantaŭen, kontraŭbatalante ĉiam teruran venton; haltiginte la motoron, ili povis sendangere malsupreniri, post vojaĝo de tri horoj. Laŭ diroj de Wellmann, tiu direktebla estas la plej forta kaj la plej firma el la aerŝipoj ĝis nun konstruitaj: « Post tiuj eksperimentoj, li diris, oni povas certigi, ke, dum bona somero, tiu direktebla povos iri al la Poluso. Mi kredas, ke la ideo estas prave praktika. Ĉion, kion oni povas per laboro fari, estas farota. »

Daŭronita.

MARCEL FINOT.

P. S. — En proksima artikolo mi parolos pri la aeroplanoj. Mi estos tre dankema al nefrancaj samideanoj, kiuj bonvolos sendi al mi sciigojn pri tio kaj ankaŭ pri ĉiuj aferoj sciencaj: tiamaniere oni povos verki kronikon vere internacian. (Adreso: 23, rue de l'Université, Reims).



## LORD KELVIN.

La mezon de decembro mortis Lordo Kelvin, unu el la malmultaj tiamrestantaj sciencistoj de tiu mirinda aro, kiu vivis kaj laboris je la tempo, kiam la potenco de vaporo kaj de ĝia eĉ pli forta frato elektro estis altturnata al la homuzoj.

Naskite en Irlando la 1824<sup>an</sup> j. kiam Georgo kvara regis, li vivis kiel regnato de kvar Britaj regnestroj. Antaŭ ol li nobeliĝis, oni lin konas kiel William Thomson. Dum siaj unuaj dek jaroj, li estis instruata de sia patro. La patro estis farmastrido kiu, spite ĉiun malfacilaĵon, kiun oni povas imagi, estis sin instruinta science, tiel sukcese ke la universitato Glasgova estis lin nominta doktoro de leĝoj; kaj fine la universitato, kien li foje estis veturinta el Belfast per kalkboata vojaĝo kvartaga, proponis al li la matematikan profesoran seĝon.

Tiel juna Thomson venis kun sia patro Glasgovon kaj deknunujara fariĝis studento. Oni interesiĝas je la fakto, ke la komenca ekzercado de ĉi tiu granda scienca animo estis lingvoj-latina kaj la greka. El Glasgovo Thomson iris Kembrigon kaj eniris la Kolegion Sanktapetran. Eĉ dum la studenta tempo la geneco sin certigis, sed ne ekzigis virajn sportojn kaj amuzojn, ĉar la estonta famulo gajnis la « argentajn remilojn », kaj remis en la okta universitata. Ĉetere li estis la prezidanto de la muzika societo.

Kembrigon deirinte, Thomson iris Parizon kaj studis ĉe Renault. Poste, kvankam nur dudekdujara, li estis nomata profesoro naturafilozofia en la Glasgova universitato, kie li restis kvindek tri jarojn. Tial oni ofte supozas, ke Kelvin estis Skoto. Efektive kvankam li devenis de skota familio, li estis naskita Irlande; sed sendube li posedis la « fervoran sagacecon de la skotoj. »

Kelvin estis unu el la unuaj, kiuj ĝustvalore taksis la elpensajon



LA KORBEGO KAJ LA HELIKO DE LA AEROSTATO.

de Joule, ke la varmeo estas energio ne materiala; sed la juna sciencisto unue honkonigis en 1866, kiam la unua sukcesa Atlantika submara telegrafafadeno kunigis la novan mondparton kun la malnova. Li estris la malsuprenmetadon de aliaj submaraj telegrafafadenoj kaj foje, kiam li estis sur telegrafŝipo, li elpensis la bonkonatan metodon por mezuri la maran profundecon per fortepiana metalfadeno. Premadmezurilon ĉe la fino de la metalfadeno oni rigardas, por ekscii la profundecon. Per la uzo de ĉi tiu elpensajo « flugantajn profundmezurojn » oni povas arangi.

La plibonigita marista kompasoj estas ankaŭ elpensajo de Kelvin. Preskaŭ ĉiuj ŝipoj portas Kelvinajn kompasojn. Neŝancelebleco kaj ĝusteco estas la ĉefaj ecoj de ĉi tiu kompasoj. Sed kiel ajn grava estas tiu elpensajo, ĝi tamen ne estas la ĉefa el liaj kvindek patentoj. Estas ankaŭ la spegula elektromezurilo per kiu la elektraj ondetoj, faritaj malfacile legeblaj de la longeco, povas esti klare legataj. La plibonigajo de ĉi tiu elpensajo ne nur montris sed skribis la senditaĵojn, kaj ĉi tiu elpensajo nuntempe skribas en preskaŭ ĉiuj submaratelegrafaj stacioj.

Estis tri aferoj kontraŭ kiuj Kelvin ne povis ne batali. Unue Hegel, kiu dubigis la Newtonan teorion, due la brita sistemo de mezuroj kaj peziloj, kaj trie la nesufiĉeco de la Kembrigaj ekzamenoj.

Unu el liaj favoritaj vortoj estis « tetra-kaidekahe dronal ». Tiajn vortojn li surverŝis sur la kapojn de la studentoj, kiuj ofte petolbruis, dum ilia majstro perdis je ia eksperimento. La elverkado de kelke da liaj eksperimentoj fariĝis teruran mokaplaŭdo de la studentoj; ekzemple, kiam li pafis pendolon per malnova pafilado por kalkuli la rapidecon de tiu kuglo; ankaŭ kiam li ĉion forgesis ludante la francan kornon por instrui je la sono. Ĉe tiu okazo li nur vekigis, kiam oni al li jetis moneron kvazaŭ al almuzulo.

Tian sindonecon al sia verko havas ĉiu famulo, ke li ofte aperas ridinda; sed nur unu momenton. Poste la cerbo ekbrilas denove. La cerbo de Lordo Kelvin nun dormas. Aliaj taŭguloj daŭrigu la verkegon, kiun li kaj liaj kunuloj komencis!

ANDREW WILSON, el Edinburgo (Skotlando).



## LA NUNTEMPA MANGĜULO

De la tago kiam oni ekuzis lignon por fabriki ĵurnalpaperon gigantapaŝe progresadis la detruo de l' arbaroj. Kiu estus iam supozinta, ke la triumfo de la perioda gazetaro komencus la finon de la ambaŭmondaj arbaregoj. La senarbarigo de Norvegujo, kiu de duoncentjaro provizas per konstrua ligno la duonon de Eŭropo, estas tute, aŭ preskaŭ, plenumita. Felice Rusujo ne estas ankoraŭ provizita per fervoja relreto komparebla je tiuj de l' okcidentaj landoj. Tial ĝiaj arbaroj estas provizaĵo por l'estonto.

Pli rapide iris la afero en Nova-Mondo, kie longatempoj oni kredis, ke la grandegaj arbaroj de Unuigitaj Ŝtatoj kaj Kanado sendangere suferos miljaran ekspluatadon. Tio estis grava eraro, kiu pravigis bedaŭrindan malŝparegon. Tial ambaŭ registaroj pretiĝas prizorgi, per severaj leĝoj, la ceteron de l' arbaroj, kiuj, antaŭ kvindek jaroj, kovris du trionojn da ĝiaj teritorioj.

Nur parolante pri la paperfabrikado de Kanado, jen estas instrua nombroj:

En 1888, tiu industrio konsumis 154.000 kilojn da juna ligno. En 1905, ĝi mangis 2.470.000 k. Se daŭrus tia nombra progresado, la ĵurnalpapero, tre baldaŭ, estus senarbiginta la Kanadajn arbarojn, tiom pli ke la bruladoj, preskaŭ ĉiam kaŭzitaĵaj per fajreroj de lokomotivoj traveturantaj la abiajn arbarojn, efiĝe kunhelpas al la detruo.

Tiel staras la demando: Kiam mankos ligno, kiel oni faros la ĵurnalpaperon? Se ligno ekmankos, kiu prizorgos la estadon de la « unucenda gazetaro ».

Kalino (1) respondus, ke, tuj senigite je malkara papero, oni ree alprenos la praavan pergamenon. Laŭ JACQUES D'IZIES,

el « La Revue forestière de France », tradukis R. BACQUET.

# La Fratoj de Mowgli.

Verkita de la famega angla aŭtoro RUDYARD KIPLING.

Rudyard Kipling, la aŭtoro de « La Fratoj de Mowgli » estas mondfama, kaj ricevis la literaturan kronon antaŭ ne longe, ricevante la « Nobel » premion. Li estas feliĉa en tio — malsimile al multaj aliaj — ke li estas juĝita kiel majstro dum lia vivo, kaj ne devos atendi por tio, ĝis li estos irinta al « la alia lando ».

Li naskiĝis en Hindujo en 1865, kaj estas la filo de Lockwood Kipling, C. I. E., antaŭe, eble ankoraŭ, «curator» de la Lahore'a Muzeo, kaj kiu publikigis literaturajn verkojn, kaj ankaŭ ilustris multajn el la verkoj de sia filo.

Rudyard Kipling komencis sian profesian vivon estante subredaktoro de la ĵurnalo « India Civil & Military Gazette & Pioneer »; kaj baldaŭ koniĝis kiel forta kaj originala verkisto. Li estas la majstro de la « mallonga rakonto »; neniam estas vorto troa, aŭ vorto maltroa; kaj la leganto ĉiam sentas, ke nur ĝuste tiel historietoj devus esti verkita. Lia unua publikaĵo estis « Departmental Ditties » (Departementaj Kantetoj) en 1886, kaj de tiam, lia famo pli kaj pli grandiĝis, ĝis nun kiam li ricevas la plej grandan honoron en ĉiuj landoj. Liaj rakontoj pri britaj soldatoj en Hindujo nepre altiris la publikan atenton, kaj lia eltrovo de « Tommy Atkins » (nomo, kiun li elpensis por la angla soldato entute) kun liaj bonaj kvalitoj, igis lin kara al la brita publiko malaltklasa; liaj historietoj pri brita vivado en Hindujo kontentigis la pli altajn klasojn, kaj tiuj pri Hindujo kaj la Hinduoj, kun iliaj mil superstiĉoj, kredoj kaj dogmoj, plezurigis la pli

filozofiemajn, la pli pensemajn el homoj. En tiu fakto kuŝas la ĉefa ĉarmo de Rudyard Kipling: li plaĉas al ĉiuj. Aliaj aŭtoroj verkas celante tian aŭ alian specon de spirito; Kipling celas kaj trafas ĉiujn specojn, de la juna al la maljuna, de la gajaj kaj ridemaj al la malgajaj kaj seriozaj. La « Jungla Libro », el kiu venas la « Fratoj de Mowgli », estas verko kiu, kvankam celanta la junan spiriton kaj fantazion, nepre atingas la pli maturan; kaj ĉiuj, kiuj amas la mutajn bestojn, legas kun plezuro kaj komprenas la suban lecionon pri la pli justaj leĝoj de la Junglo.

Bedaurinde, la plimulto el la verkoj de Rudyard Kipling estas tro brita karaktere, kaj perdis tro multe — ellasante la idiotismojn — por ilin traduki; sed estas kelkaj rakontoj kaj unu novelo « La Lumo kiu estingiĝis » (The Light which failed), kiuj interesus ĉiujn.

La versoj de tiu ĉi lerta verkisto enhavas fajron kaj « movecon », kiuj tuŝas la koron, kaj igas la sangon kuri rapidege ĉe ĉiuj Angloj, sed la temoj estas — kiel en la soldataj rakontoj — ĉefe britaj, kaj nur tiuj, kiuj bone konas la anglajn lingvon, landon, popolon kaj kutimojn povus ŝati ilin; tial, kiel estas montrite en Svedujo, kvankam li estas glora en ĉiuj partoj de la mondo, la koroj de la Angloj estas la vera hejmo de Rudyard Kipling.

C. W. O.



Okazis je la sepa de tre varma vespero. Patro Lupo vekigis el sia tagripozo, gratis sin, oscedis, kaj etendis siajn piedegojn — unu post la alia — por forigi la dormsenton el la pintoj de siaj ungegoj. Patrino Lupino kuŝis kun siaj kvar bleketantaj idoj, kaj la luno enbrilis en la enirejon de la kaverno, kie ili ĉiuj loĝis. « Augrh ! » diris Patro Lupo, « jam estas tempo ree ĉasi »; kaj li estis elsaltonta malsupren, sur la monteton, kiam ombreto trapasis tra la enirejo kaj ploretis: « Bonŝanco iru kun vi, Ho Estro de la Lupoj; kaj bonŝanco kaj fortaj blankaj dentoj iru ankaŭ kun la nobelaj infanoj; por ke ili neniam forgesu la malsatulojn en la mondo ».

Ĝi estis la Ŝakalo, Tabaki la Pladlekanto; kaj la lupoj de Hindujo malestimas Tabaki'n, ĉar li kuras tien ĉi kaj tien, farante malbonaĵojn, dirante malveraĵojn, mangante ĉifonojn kaj ledajn pecetojn el la vilaĝaj forĵetaĵoj. Sed ili timas lin ankaŭ, ĉar Tabaki, pli ol ĉiu ajn en la Junglo, kelkafoje freneziĝas; kaj tiam, li forgesas ke iam li timis iun ajn, kaj trakuras tra la arbaro, mordante ĉion, kion li renkontas. Eĉ la tigro forkuras, kaj kaŝas sin, kiam eta Tabaki freneziĝis, ĉar frenezeco estas la plej malhonoraĵo, kiu povas ataki sovaĝan beston. Ni nomas tion hidrofobio, sed ili nomas ĝin « dewanee » la frenezeco — kaj ili forkuras.

« Eniru do, kaj rigardu ! » diris Patro Lupo severe, « sed ne estas manĝaĵo tie ĉi ».

« Por lupo, ne », respondis Tabaki, « sed por tia malgrandanimulo kiel mi mem, seka osto estas bona festeno. Kiaj gentoj ni estas, la « Gidur-Log » (la ŝakala popolo), ke ni elektu ! » Li kuris al angulo de la kaverno, tie li trovis oston de cervo, kaj sidigis gaje, ĝin fendante.

« Dankegon pro tiu ĉi bona manĝaĵo », li diris, lekante siajn lipojn. « Kiel belaj estas la nobelaj

infanoj ! Kiel grandaj estas iliaj okuloj ! Kaj tiel junaj ! Ja, ja, mi devus memori, ke infanoj de reĝoj estas viroj tuj de la komenco ».

Nu, Tabaki sciis, tiel bone kiel iu ajn, ke nenio estas pli malbonŝanca, ol komplimenti infanojn antaŭ iliaj vizaĝoj; kaj li ĝojis vidi Patrino kaj Patron Lupon maltrankviliĝi.

Tabaki kviete sidadis, ĝojante pro la malbonaĵo, kiun li estas farinta; kaj tiam li diris malice:

« Shere Khan, la Grandulo, ŝanĝis siajn ĉasejojn. Li ĉasas inter tiuj ĉi montoj dum la sekvonta luno, tiel li diris al mi ».

Shere Khan estis la tigro, kiu loĝis apud la Waingunga Rivero, malproksime du dek mejlojn.

« Li ne havas la rajton ! » komencis Patro Lupo kolere; « laŭ la Leĝo de la Junglo, li ne havas la rajton ŝanĝi sian loĝejon senaverte. Li timigos la tutan ĉasaron je dek mejloj ĉirkaŭe, kaj mi — mi devas mortigi por du, la nunajn tagojn. »

« Lia patrino ne nomis lin Lungri (la Jamulo) senkaŭze », diris kviete Patrino Lupino, « li estas lama unupiede de sia naskiĝo. Tial li nur brutojn mortigas. Nune, la vilaĝanoj de la Waingunga koleras kontraŭ li, kaj li alvenas tien ĉi kolerigi niajn vilaĝanojn. Ili trapasos tra la junglo serĉante lin, kiam li estos malproksime, kaj ni kaj niaj infanoj devos forkuri, kiam la herbejoj estos ekbruligitaj. Ja, ni estas vere dankemaj al Shere Khan ! »

« Ĉu mi diros al li pri via dankemeco ? » diris Tabaki.

« For ! », blekis Patro Lupo, « For ! kaj ĉasu kun cia mastro. Ĉi faris sufiĉe da malbonaĵo por unu nokto ».

« Mi deiras », dolĉe respondis Tabaki, « vi povas aŭdi Shere Khan'on malsupre en la arbetoĵo. Mi estus povinta ŝpari al mi mian klopodon ».

Patro Lupo aŭskultis, kaj malsupre en la valo, kie estas rivereto, li aŭdis la koleran, plendan, unu-tonan bleketon de tigro, kiu nenion kaptis, kaj ne zorgas de l' « ĉu la tuta ĵunglo tion scias. »

« La malsaĝulo ! » diris Patro Lupo, « komenci la laboron de la nokto tiel brue. Ĉu li pensas, ke niaj cervoj similas al liaj grasaj Waingunga'aj bovoj ! »

« Silentu ! Estas nek bovo nek cervo, kiun li ĉasas hodiaŭ vespere », diris Patrino Lupino, « estas Homo. »

La bleketo estis ŝanĝiĝinta ĝis zuma murmureto, kiu ŝajne sonis de ĉie ĉirkaŭe. Estis la bruado, kiu konfuzigas la arbohakistojn kaj vagistojn, kiuj dormas liberaere, kaj kiu igas ilin, iafoje, efektive enkuri en la buŝegon de la tigro.

« Homo ! » diris Patro Lupo, montrante ĉiujn siajn blankajn dentojn. « Fau ! ĉu ne troviĝas sufiĉe da skaraboj kaj ranoj en la akvujoj, ke li volas manĝi Homon, kaj sur nia bieno ! »

La Leĝo de la ĵunglo, kiu neniam faras ordonon senrezone, malpermesas al ĉiu besto manĝi Homon, esceptinte kiam li mortigas, por montri al siaj infanoj la manieron mortigi, kaj tiam li devas ĉasi ekster la ĉasejoj de sia gento. La vera kaŭzo de tiu ĉi ordono estas, ke hommortigo signifas, pli-malpli frue, la alvenon de blankaj viroj rajdantaj elefante, kaj portantaj pafi'ojn; kaj de centoj da brunaj viroj kun sonorilegoj kaj raketoj kaj lumigiloj. Tiam ĉiuj en la ĵunglo suferas. La motivo, kiun la bestoj diras inter si, estas ke Homo estas la plej malforta kaj la plej sendefenda el ĉiuj estaĵoj, kaj estas nemetiiste ataki lin. Oni diras ankaŭ — kaj tio estas vera, ke hommanĝantoj iĝas skabiaj, kaj perdas siajn dentojn.

La murmureto plilaŭtiĝis, kaj finiĝis je la laŭtega « Aarh ! » de la atako de tigro.

Poste aŭdiĝis blekego, netigra blekego, de Shere Khan. « Li maltrafis », diris Patrino Lupino, « kio ĝi estas ? »

Patro Lupo elkuris malmultajn paŝojn, kaj aŭdis Shere Khan'on kolerege bleketantan kaj murmurantan, dum li faletas inter la kreskaĵoj.

« La malsaĝulo ne havis pli da saĝo, ol salti en la fajron de arbohakisto, kaj li bruligis siajn piedegojn, » diris Patro Lupo, « Tabaki estas kun li. »

« Iu venas de malsupre », diris Patrino Lupino, levante unu oreton, « Pretiĝu ! »

La arbetoj moviĝis iomete en la arbetaĵoj, kaj Patro Lupo klinis sin, preta por eksalti. Tiam, se vi estus estinta tie, vi estus vidinta la plej mirindan vidaĵon en la mondo... lupon haltintan saltante. Li eksaltis antaŭ ol li povis vidi tion, kion li alsaltis; kaj poste li penis sin haltigi. Do li saltegis kvar aŭ kvin futojn supren en la aero, kaj retrafis la teron preskaŭ sen antaŭeniĝo.

« Homo ! » li kriis, « Homido ! rigardu. »

Ĝuste antaŭ li, sin subtenanta per malalta branĉeto, staris nuda bruna infano, kiu nur povis ekmarŝi — la plej dolĉa kaj la plej mola estaĵeto, kiu iam venis nokte al la kaverno de lupo. Ĝi rigardis la vizaĝon de Patro Lupo, kaj ridis.

« Ĉu tiu estas ido de homo ? » diris Patrino Lupino, « neniam mi vidis unu; alportu ĝin tien ĉi. »

Se necesas, lupo, kiu kutimas porti siajn proprajn idojn, povas same porti buŝegon, sen danĝero ĝin rompi; kaj kvankam la makzeloj de Patro Lupo efektive fermiĝis sur la dorson de la infano, ne unu

dento eĉ gratis la haŭton, kiam li metis ĝin inter la lupidojn.

« Kiel malgranda ! kiel nuda, kaj... kiom kuraĝa ! » diris Patrino Lupino, dolĉe. La infano estis puŝinta sin inter la lupidojn, por alproksimiĝi al la varma felo. « Aha ! li prenas sian manĝadon kune kun la aliaj. Do tiu ĉi estas homido. Nu ! ĉu iam estis lupino, kiu povis fanfaroni pri homido inter siaj infanoj ? »

« Okaze mi aŭdis pri tio, sed neniam inter nia Aro, aŭ dum mia vivado, » respondis Patro Lupo. « Li estas tute senhara, kaj mi povus mortigi lin per unu tuŝo de mia piedo. Sed, vidu, li rigardas min vizaĝen, kaj ne timas. »

La lunlumo, kiu brilis en la kaverno, subite mal-lumiĝis per la grandaj kvadrataj kapo kaj ŝultroj de Shere Khan, kiu aperis ĉe la enirejo. Malantaŭe, troviĝis Tabaki, bleketanta: « Via Moŝto, via Moŝto ! ĝi eniris tien ĉi ! »

« Shere Khan treege honoras nin », diris Patro Lupo, sed liaj okuloj brilis kolere. « Kion bezonas Shere Khan ? »

« Mian ĉasaĵon. Ido de homo venis tien ĉi, » respondis Shere Khan. « Ĝiaj gepatroj forkuris. Donu ĝin al mi. »

Shere Khan estis saltinta en la fajron de arbohakisto, kiel Patro Lupo estis dirinta, kaj li estas kolerega pro la doloro de siaj bruligitaj piedegoj. Sed Patro Lupo scias, ke la enirejo estas tro mallarĝa, por ebligi al la tigro eniri. Eĉ tie, kie li estas, la ŝultroj kaj antaŭaj piedoj de Shere Khan estas premegataj, kiel estus tiuj de viro penanta batali en barelo.

« La Lupoj estas libera Popolo, » diris Patro Lupo, « ili akceptas ordonojn de la Luparestro, kaj ne de ia striita brutmortigulo. La homido estas nia; — por ĝin mortigi, se ni tiel decidis. »

« Kia diro estas tio ĉi ? Je la nomo de la bovviro, kiun mi mortigi, ĉu mi devas stari atende, en via hundnesto, por miaj justaj rajtoj ? Estas mi, Shere Khan, kiu parolas ! »

La blekego de la tigro tondre plenigis la kaverton. Patrino Lupino sin liberigis de la idoj, kaj saltegis antaŭen; ŝiaj okuloj, similaj al du verdaj lunoj en la mallumeco, rigardadis la brulantajn okulojn de Shere Khan.

« Kaj estas mi, Raksha (la demonino), kiu respondas. La homido estas la mia, Lungri... la mia al mi ! Ja, oni ne mortigos lin. Li vivados, por kuri kun la Luparo, kaj ĉasi kun la Luparo; kaj fine, vidu, ĉasisto de nudaj idetoj — ranmanĝulo — fiŝmortigulo — li ĉasos cin ! Nun, foriru, aŭ je la nomo de la Sambhur, kiun mi mortigis (mi ne manĝas malnutritajn brutojn) ree ci iros al cia patrino — bruligita besto de la ĵunglo, pli lama, ol kiam ci venis en la mondon. Foriru ! »

Patro Lupo mire rigardis ŝin. Preskaŭ li estis forgesinta la tagon, kiam li bataladis kontraŭ kvin aliaj lupoj pro Patrino Lupino, kaj gajnis ŝin en justa batalo, kiam ŝi kuris kun la Aro, kaj ne estis nomata la « Demonino » nur komplimente.


C. W. OXENFORD.

Prezidantino de « E. Vagabonda Klubo », Anglujo.

Dairigola.



# TRA LA MODO



Konforme al mia promeso, mi tuj parolos pri la felo, tiu ornamilo tiel malnova kiel la mondo, per kiu jam sin vestis la gefinfanoj de Cain (Kain' : unuenaskito de Adamo kaj Evo) kaj sin ornamis la tiamulinoj. Estus ja tre interese scii, kiamaniere ili portis la boaojn el haretaj de mamuto, kaj estas ja tute sendube, ke ni malŝatus tiun ornamaĵon — kredeble iom tro sovaĝan — ni, la delikatulinoj de la XX<sup>a</sup> jarcento, por kiuj la felistoj faras tiom da mirindaĵoj, ho ! tiaj, ke niaj mortintaj malsuperaj fratoj, per kies feloj ni nin plibeligas, ŝajnas malsovaĝigitaj kaj vivantaj bestoj karesantaj nin. Tiel malpezaj kaj

Ne malbela novaĵo estas la ĉevalidfelo muarita aŭ karakulita, uzata por longa jaketo kun kolumo-ŝalo el nigra atlaso aŭ silko. Tiaj nigraj kolumoj estas modegaj : oni vidas ilin ĉe ĉiuj felovestoj anstataŭantajn brodaĵojn kaj galonojn.

La plej preferata estas la « breitschwantz » kiu, senkontraŭdire, estas la reĝino de l' feloj, kaj per kiu oni faras tutajn robojn. Tre moda ankaŭ la « chinchilla » ofte uzata kun veluro aŭ puntoj el Irlando aŭ Venecio.

Ĉarma eltrovaĵo estas la ermenfelo frangumita per vosto de zibelo, kies brunruĝa koloro sur la blanka ermeno estas belvida kontrasto.

Multe da sukceso havas la feloj de vulpo kaj arĝentea vulpo ; kaj fine vespere triumfas la blanka linko kun senmakula felo.

La nunaj mufoj estas kvadrataj kaj plataj monumentoj havantaj iafaje dekon da vosto. Kelkaj estas el felo kaj el Irlanda punto samkolora kiel la felo ; aliaj, elegantegaj, estas tute faritaj el vosto.

Multaj malgrandaj ĉapeloj estas el lutro-felo vera aŭ imitita : martro-lutro, kastoro-lutro, lutro el Hudson, kaj eĉ el komuna kuniklo nerekonebla kaj belege nomata simila-lutro.

Kelkaj grandaj ĉapeloj estas garnitaj per vosto, aliaj per ermena kaj zibela feloj, aliaj per « breitschwantz » ; kaj vere bedaŭrinde estas, ke oni kaŝas tiun ĉi lastan per brodaĵoj, perloj, brilajetoj.

Beleta la blanka ŝafidfelo miksitita kun blanka tulo tute brodita per arĝentitaj brilajetoj.

La podicepso sur veluro estas ĉarma galono. Tre ŝatata por junaj fraŭlinoj, la lanugo de ĉigno.

Nia hodiaŭa modelo estas palto enkadrigita per Persa astrakanfelo. Kolumo kaj ornamaĵo de l' manikoj el sama felo. Brodaĵo el galono.

## Vira modo.

Por igi plezuron al kelkaj samideanoj, kiuj tiel ĉarme min riproĉis tial, ke mi ne parolas pri la viraj vestaĵoj, mi, korvarme dankinte ilin, diras, ke oni aldirektigas — sed malprave kiel testudo — al la modo laŭ la Imperia epoko.

La frako, kies returnaĵoj estas longaj, estas tre ĝustalfarita ĉe la talio, kaj havas tre longajn baskojn. La blu- kaj la prunokoloro estas la « lasta krio » de la Modo.

La formo de l' pantalonoj estas sama por la urbo aŭ por

ceremonioj. Ili estas mezelarĝaj ĉe l' genuo kaj malplilarĝigas ĝis la maleolo. La sola ĉefaĵo kaj gravegaĵo estas la antaŭa kaj malantaŭa faldoj. Ha ! karaj samideanoj, se vi volas esti laŭmoduloj, societuloj, zorgu, atente zorgu pri la konservado de l' faldoj Ĝi vespere sternu vian pantalonon sur la tapiŝon de via dormoĉambro, kaj sur ĝin metu vian komodon — fi ! neserioza plumo, ĉu vi povas esti mokema, kiam la demando koncernas la Modon ? — metu ion pezan, por ke ne malaperu la belŝajnaj faldoj.

La vesperkunvena surtuto, laŭ la formo « Talma », estas nigra aŭ malpale griza, kaj anstataŭ poŝoj havas nur du vertikalajn malfermaĵojn.

La jako, kies returnaĵoj estas kovritaj je nigra silko, kaj kies malsupraĵo estas grandampleksa, estas longa ĝis la genuo kaj malpli ĝustalfarita ol la antaŭan jaron. Modega la griza koloro, kiu anstataŭas la nigran por funebraj vestaĵoj.

La jaketo — malpli moda ol la pasintajn jarojn — estas iom pli longa kaj borderita per galono.

Tre ŝatataj la striitaj veŝtoj.

La jako, kies dorsaĵo estas arkkurbigita por junuloj kaj sen kunkudraĵo por maturaj viroj, estas nun akceptata en okazo, ĉe kiuj alitempe jako kaj jaketo estis solaj permesitaj.

La surtuto por la urbo, kies malsupraĵo estas vasta, bone desegnas la talion.

Ho ! kial, ĉarmaj samideanoj, vi petis pri kroniketo por vi ? Nun, ho ve !... nun mi estas devigata diri, ke sendube pro tio, ke la vira modo Londona estas la kriterio de la eleganteco, la francaj elegantuloj forigas lipharojn kaj barbon. Mi ne scias, vere, ĉu tiel malbelaj — jes, sinjoroj, tiel mi opinias... pri la francoj — ili scios akiri la amon de miaj samlandanoj. Kiom da kontrasto en la vivo ! Precize kiam ni malprave trouzas la falsajn harojn, niaj karaj tiranoj ankoraŭ pli malprave forlasis siajn proprajn haretajn. Kiu scias ? Eble ili oferdonos ilin al niaj haristoj.

ROKSANO.



## Mallonga korespondado.

**Agostino en Torino.** — Kiel vi vidas, mi plezure plenumis vian peton, kaj aldonis kronikon pri viraj vestaĵoj. Ho ! ĉar ĉiuj virinoj havas nun densegan hararon, vi hontas pro via senhareco. Kiom malprobinda vi estas, ĉar vi volas imiti nian malsaĝecon ! Fine, konsoliĝu : Marius Heng, 33, rue Bergère, Paris, havas belegajn vertharajn tute nevideblajn. Petu pri lia katalogo.

**Admirantino de Tra la Mondo.** — Ne, vere afabla flatemulino, mi ne scias ĉion ; sed tamen mi havas la eblon respondi vian demandon ; ĉar mi scias, ke mia amiko, D<sup>ro</sup> Dumas, ofte kaj sukcese konsilas, kiam-la apetito estante malakra, oni sentas naŭzon, « suĉi » oranĝon, kvaronon da horo antaŭ la manĝo.

R.

Roksano, 2, rue Abélard, Béziers, France, respondas private la leterojn enhavantajn 50 centimojn, kaj per la revuo tiujn enhavantajn 25 centimojn.



El « La Mode Parisienne »  
49, Avenue de l'Opéra, Paris

# PRI ESPERANTO

## La « Delegacio » kaj Esperanto.

De ĉirkaŭ 3 monatoj oni multe parolis en nia gazetaro pri decido de la Komitato (2) balotita de la « Delegacio (1) por la alprenado de internacia helpa lingvo ».

Tiu komitato, post seriozaj kaj multaj kunsidoj, decidis « alpreni principe Esperanto'n, pro ĝia rilata perfekteco kaj la multaj kaj variaj aplikoj jam el ĝi faritaj, kun rezervo pri ĵaj ŝanĝoj farotaj de la konstanta Komiso (3) laŭ la direkto difinita de la konkludoj de l' Raporto de la sekretarioj kaj de la projekto de *Ido*, penante interkonsenti kun la esperantista Lingva Komitato... »

Ĝis nun mi ne volis paroli pri tiu afero, opinante ke diskuto povas nur malutili la interesojn de Esperanto. Plue, kiel ano de la Lingva Komitato, mi juĝis, ke mi ne povas, per privata ago, ĝeni la agadon de la Komitato mem, aganta kiel reprezentanto, libere akceptita, de la esperantistaro. Pro tio, eĉ mi ne volis respondi al alvoko presita en *Internacia Scienca Revuo*, kvankam tiu alvoko estas atentinda pro la personeco de kelkaj el liaj subskribintoj.

La okazintaĵoj pravigis tiun sintenanon. Mi ĵus ricevis la « Raporton pri la laboroj de la Komitato » kun letero-cirkulero de la sekretarioj, S-roj Leau kaj Couturat, plendantaj pro neĝustaj kaj partiaj diroj aŭ interpretoj pri la agado de la delegacia Komitato, kaj pro malobservo de kontrakto interkonsentita inter ĝi kaj la Lingva Komitato.

Ofendita pro tio, la delegacia Komitato sciigis, per siaj sekretarioj, ke « senligita pri la sekreto promesita, la Komitato reprenas sian agan liberecon » kaj ke « ĝi sin turnos de nun, kune al la 'popolo esperantista mem' kaj al la senpartia publiko, kiu estas ankoraŭ akirota, eldonante duonmonatan ĵurnalon en Esperanto reformita ».

Kvankam ŝajnas, ke la Delegacio, funde, ne deziris interkonsenton, kaj celis nur altrudi sian *Idon*, ne akcepteblan kaj akceptindan de la esperantistoj, ni volas ankoraŭ esperi, ke la aferoj ne estas tiel gravaj, kiel ili ŝajnas, kaj ke interkonsento povos okazi.

Se oni trovas laŭdiinda la agitado por la reformoj, ekz. tiu en *Belga Sonorilo*, *Internacia Scienca Revuo* kaj *Esperanto*, oni devas akcepti ankoraŭ, ke la nereformemaj batalas por siaj ideoj; kaj ĉar prokrasto okazis pri la sendo de la decido de l' Lingva Komitato, eble tio ne sufiĉas por instigi la kreon de skismo, tiom malutilotan al la ĝeneralaj interesoj, por kiuj agadas la Delegacio: elekto kaj disvastigo de tiu internacia lingvo — kiom al la lingvo mem juĝita la plej perfekta kaj la plej sukceskapabla, de tiu sama Delegacio.

Ni ne povas pensi, ke komitato prezidata de homo tiel favora al Esperanto, kiel Pro<sup>o</sup> Ostwald, kaj kies sekretarioj estas tiel seriozaj kaj konantaj la tutan historion de Lingvo Internacia, faros decidajn paŝojn al rompo, ne elĉerpinte ĉiujn rimedojn al interkonsento.

Tion ĉi dirinte, mi deziras aldoni kelkajn rimarkojn personajn pri diversaj punktoj pritraktitaj dum la diskutoj ĉi supre aluditaj.

Oni riproĉis al la konservemaj esperantistoj ilian respekton al la *Fundamento* kaj supozitan rezistecon al ĉiuj reformoj. La riproĉo ŝajnas al mi malprava: unue, tiu respekto absoluta estas necese, ĉar ĝi sola prezervis la lingvon kontraŭ antaŭtempaj ŝanĝoj kaj pretenditaj plibonigoj, kiel da ĝi elpensis ĉiutage

personoj, kiuj ofte ne sciis ankoraŭ la lingvon; due, la laboroj faritaj de la Lingva Komitato de tri jaroj montras, ke ĝi ne opinias la lingvon absolute neperfektebla. (4)

Sed multaj el ĝiaj membroj opinias, ke « la plibonigado kaj perfektigado devas fariĝi ne per arbitra interbatala ruiniĝa rompadado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura*, senkonfuza kaj sendaŭgerea ». (*Antaŭparolo de la « Fundamento »*).

Efektive Esperanto estas jam lingvo vivanta, kaj tre vivanta, do ĝi devas evolui kiel evolucias la vivantaj lingvoj, t. e. per akcepto, post uzo — eĉ uzado — de novaj formoj kaj esprimoj. Ĉu oni kredas, ke okazis alie la pasado de la mezepokaj diversnaciaj lingvoj al la nunaj; de la lingvo de Rabelais al tiu de Molière, kaj de tiu de tiu ĉi geniulo al tiu de Victor-Hugo; de la parolaĵo de Shakespeare, nun ne komprenata sen klarigoj, al tiu de Kipling aŭ de Longfellow!

Jam, en sian teknikan vortaron, S-ro Verax enkondukis novajn sufiksojn, kaj, ĉar ili ŝajnis bone elektitaj, neniu, eĉ el la plej konservemaj esperantistoj songis fari ian kritikon, lasante al la tempo la taskon, ilin pravigi, aŭ forĵeti kelkajn el ili. Tia estas la vera liberema maniero por la *evolucio* de la lingvo.

Sed voli subite alĝi tiun ĉi, kun la espero igi ĝin — mi ne diras perfekta — sed senfine kaj *certe* perfektebla estas entrepreni super la homaj fortoj, ĉar neniu povas respondi pri la estonteco. La historio mem de la Lingvo Internacia, montrante ĉiutage la falon de l'esperoj de multaj serĉantoj, instigas pripensi kaj prudentiĝi. La malbonaĵoj enhavataj en la nova lingvo *Ido* sufiĉas por pravigi miajn dirojn.

Mi nomis la Lingvan Komitaton (5) la reprezentanto, libere akceptita, de la esperantistaro pri la lingvaj demandoj. Estus tre daŭre rifuzi al ĝi tiun karakteron, kiel faris, antaŭ nelonge, unu el niaj junaj samideanoj: S-ro H. Hodler, en « *Esperanto* ». Ĝi estis elektata dum nia unua kongreso, provizore, kaj tiu elekto estis rajtigata de la Ĝeneva kongreso, post propono de Dro Zamenhof.

Oni pretendas, ke tiu decido ne ligas la aliajn esperantistojn, kiuj ne ĉeestis la kongreson, ne donis voĉrajton al la ĉeestantoj, k. t. p.

Estas bedaŭrinde trovi tiajn dirojn en la buŝo de esperantistoj ĉar, en tiaj kondiĉoj, oni povas timi, ke la esperantistoj neniam sukcesos konstrui, se la progreso konsistas, konstante mal-konstrui tion, kion starigis la antaŭuloj:

Oni povas konsenti, ke la Lingva Komitato estas por Esperanto tio, kio estas la Franca Akademio por la franca lingvo, kaj la similaj institucioj por la aliaj lingvoj. Nu tiu Akademio estis fondata en 1635 de Richelieu por fiksi kaj poluri la lingvon, kaj de tiu epoko la anoj mem, kaj nur ili, post ĉiu morto, elektas la sinsekvajn membrojn. Do, realce, estas la elekto de kardinalo Richelieu, kiu, nune ankoraŭ, regas la francan lingvon. Nu, ĉu oni pensas, ke pro tio la Francoj rifuzas akcepti la decidojn de la Akademio!

Alie ekzemplo: ĉu kiam oni lernas fremdan lingvon, aŭ aniĝas ian fremdan landon, oni pretendas altrudi ŝanĝojn en la lingvo, aŭ leĝojn al la lando! Kontraŭe oni submetiĝas al tiuj ekzistantaj.

La novaj esperantistoj, envicigante en la « esperantista po-

(1) La Delegacio por la alprenado de internacia helpa lingvo estis fondata le 17<sup>an</sup> de januaro 1901, por elekti kaj disvastigi tian lingvon. (2) La 29<sup>an</sup> de majo 1907, ĝi balotis Komitaton el 12 anoj, kun la misio elekti la plej taŭgan lingvon. (3) La 24<sup>an</sup> de oktobro 1907, la komitato elektis konstantan Komision, « kies unua devo estos studi kaj fiksi la delatojn de la alprenota lingvo ».

(4) Ĝis ricevita raporto « pri la particeps sufiksos antaŭ verba finiĝo » montras, kun kia seriozece kaj kompetenteco laboras la Lingva Komitato. En tiu raporto estas kelkaj rimarkindaj leteroj de komitatanoj, kies legado estas instrua kaj speciale rekomendinda. Oni vidas en ĝi, ke la raportinto, S-ro Gaston Moch, kiu, komence, estis favora al la propono, forlasis ĝin post legado de la diritaj leteroj. Lojale li konfesas sian eraron. Tio estu averto por niaj kontraŭuloj aŭ samideanoj emaj proponi aŭ akcepti ŝanĝojn antaŭtempajn aŭ nesufiĉe ekzamenitajn. (10 Sd. ĉe Centra oficejo, 51, rue de Clichy, Paris).

(5) Oni bonvolu ne pensi, ke mi tuj defendos la Lingvan Komitaton — « elektitan laŭ neordinara maniero », diras S-ro Hodler, kiu, altparte, rifuzas al ĝi kompetentecon, — ĉar mi havas la honoron esti unu el ĝiaj membroj.

Efektive mi ne apartenas al la parto de la komitato ja iom strange, kaŭrice, elektita, kaj mi ne opinias min tuŝita de la rifuzo pri kompetenteco farita de nia samideano. Mia nomo, kun kelkaj aliaj, estis aldonata al la listo, de Dro Zamenhof mem, kiu ĵu'is, ke kelkaj bedaŭrindaj mankoj ekzistas en la nomaro el la kleraj kaj lertaj esperantistoj elektitaj dum la kunsido de Bulonjo; sekece mia membreco estas super kritikoj, kiuj atingus nian majstron mem, kaj mi ne bezonas rajtigojn. Nur principe, do, mi skribas tion, kio sekvas, sen ia ajn partepersona intereso.



polo», devas akcepti la instituciojn akceptitajn de tiu popolo. Se oni ne konsentus pri tio, esperantistaro vivus en konstanta anarĥio. Kaj kiel ajn estus elektita la nova institucio revata de tiuj, al kiuj ne plaĉas la Lingva Komitato, ĝi havus la saman sorton kiel tiu ĉi — se oni ĝin disigus — kaj kiel ĉiuj sinsekve anstataŭantaj unu la alian. Ĉar sen disciplino, respekto al la verko de la antaŭuloj, oni neniam sukcesos, ke milcentoj akceptu la kreitaĵojn de miloj, kaj ke la estontaj milionoj da esperantistoj respektu tion, kion faris la kelkaj milcentoj ilin anstataŭintaj.

La danĝera teorio, kiun mi aludas, estis tuj, kompreneble, alprenata de la Delegacio. Tiu ĉi, konsiderinte je la komenco, ke la Lingva Komitato estas la natura reprezentanto de la esperantistaro, kaj decidinte, ke ĝi devas penadi interkonsenti kun ĝi,

skribas nun, ke « la esperantistoj havas nenian reprezentanton ». Konsekvence la delegacio estas nun tute libera agi sen ia ajn atento pri ni! Estas necble pli bone doni vergojn, por sin vergigi.

Ni ne estu kiel la ranoj, kiuj postulas reĝon; kaj ni pripensu bone, ke grandega komitato internacia, kiel ĝin revas Sinjoro Hodler, estus devige neagema; sed eble ĝi malhelpus la propagandemajn iniciatojn.

Same kiel dudek jaroj estis necesaj, por ke oni povu ekpensi pri efektivigo de kelkaj prudentaj reformoj, same estas prudente ne senkreditigi nian solan, kaj solan necesan, prilingvan institucion, semante anarĥion ĉe nia anaro, kiu povas nur vivi per disciplino, kaj konfido al ĝia reprezentantaro.

A. MONTROSIER.

## Kroniko kaj Bibliografio.

**AMERIKO.** Ĉiam granda fervoro. *American Esperanto Journal* sub nova direkto de Dr<sup>o</sup> Dodge celas vigligi kaj amerikanigi sian propagandon. Ĉiam tre ampleksa nacilingva parto kun interesa Esperanta. Ekz. longa artikolo pri prez. Roosevelt kun ŝercaj kaj karikaturnaj bildoj pri la fama ŝtathomio; bona sciigo kun montra bildo pri unua aludo, en teatro, pri Esperanto.

*Verda Stelo* sciigas nin ke, dank' al la penadoj de ĝia fervora direktoro, Dr<sup>o</sup> A. Vargas, malfermiĝis kurso ĉe la « Liga Anti-alcóholica », post peto de la distinginda prez., advokato Nabor-Bolanos.

**MANILA.** « ... Tie ĉi la afero kreskas, ĉar la nombro de la anoj plimultiĝas, kaj la entuziasmo ne malgrandiĝas. Inter aliaj anoj de la Filipina Esperanto Asocio sin trovas Sr<sup>o</sup> Cameron Forbes, Ministro de Polico kaj Komerco, entuziasmega; Sr<sup>o</sup> Morgan Shuster, Ministro de Edukado, kaj multaj aliaj personoj altrangaj. Sr<sup>o</sup> Shuster min promesis, antaŭ ne longe, baldaŭ enkonduki en la lernaron de la alturnejoj, elekta kurso Esperantan, kiu havos egalan valoron kiel la aliaj alilandaj lingvoj... Plie mi estas klopodanta decidigi la Generalon Wood, komandanto de la tuta militistaro de la Insuloj Filipinaj, ke la oficiroj studu Esperanton, kaj verŝajne li tion faros. » El letero de Dr<sup>o</sup> H. W. Yemans, M. D., Manila.

**EN LA ARMEO.** En Lyon<sup>o</sup>, granda propagando de Sr<sup>o</sup> F. Drudin, membro de la Nacia Komitato por la propagando de Esperanto ĉe la Ruĝkrucaj Societoj: 8 paroladoj ĉe ĉiuj kazernoj: piedartilerio, kavalerio, infanterio; multaj oficiroj ĉeestis la paroladojn, inter aliaj la regiment- aŭ batalionestroj: K<sup>o</sup> Audry, K<sup>o</sup> Weinachter, Kolonelo Alba. La 11<sup>a</sup> de Januaro, granda parolado sub la aŭspicioj de la mondkonata Generalo Gallièni, eksguberniestro de Madagaskar kaj milita guberniestro de Lyon<sup>o</sup>, de Sr<sup>o</sup> Déronzières, prof. de angla lingvo ĉe la supera komerca lernejo.

En Manila, vidu en la landa kroniko.

Nia amiko Leŭt<sup>o</sup> Bayol, kaj Dr<sup>o</sup> Dupont, ambaŭ 51<sup>a</sup> infanteria reg. en Beauvais (Oise) France, deziras ĉiuspecajn sciigojn kaj ilustraĵojn pri Ruĝa Kruco en ĉiuj landoj, por verko de ilustrata volumo pri *Ruĝa Kruco*.

**KOMERCO.** Ni sendas kortuŝan memoron al nia distinginda samideano, Sr<sup>o</sup> Maurice Lecaron, unu el la direktoroj de la grava firmo Gellé frères, subite mortinta je la komenco de Decembro. Lia nomo restos ligita al la kreo de franca tradukistaro, kiu celas disvastigi la uzadon de Esperanto ĉe la komercistoj.

**TURISTA PROPAGANDO.** Jen novaj sciigoj pri la grava alveno de Esperanto, de la *Turista Fako* en Nov-Zelando.

« Sr<sup>o</sup> F. E. Donne, estro de la Turista Fako, decidis, ke estus profito por la Fako, se lernus Esperanton ĝiaj oficiroj, kies devoj ilin rilatigas kun la vojaĝanta publiko, el kiu iuj jam fidis je Esperanto por sin helpi dum la vojaĝado. »

El « *New Zealand Times* » kaj « *Lyttleton Times* », laŭ letero de Sino A. Chapman Taylor.

Estus dezirinde, ke la estroj de ĉiuj organizacioj similaj al la Turista Fako de Nov-Zelando opiniu same, kiel Sr<sup>o</sup> Donne.

*La Problemo de la Malaro.* Tre interesa traduko, de Kapitano Alesiano, laŭ originala artikolo de nia distinginda samideano Alfred H. Fried (1). Ĝi estas historia studado pri la

konstantaj ĉiulandaj armadoj, kun pripensoj pri la rimedoj ilin haltigi. Mi interese legis la broŝuron, kiu enhavas partojn kapablajn mirigi personojn fremdajn, kiaj mi, al la temoj preparolataj en ĝi. La solvon, la aŭtoro ĝin vidas nur en ĝenerala konkludo de konsentaj traktatoj; sed, atendante, li, *kiel pacifisto*, ne konsilas ĝeneralan malarmon (supozante, ke ĝi estu ebla), kiu igus pli okazeblaj la militojn, ĉar oni ne timus militon per malgrandaj armeoj, ne kapablan kaŭzi — kiel milito inter armitaj nacioj — la eblan ruiniĝon kaj pereon de l' venkito, kiel la ruiniĝon de l' venkinto kaj parte de la neŭtraj; li ne konsilas ankaŭ partan malarmon, kapablan ankaŭ okazigi militon: inter popolo malarmita parte ĉe unu el siaj landlimoj, kaj najbara popolo minacata de la disponebligataj militfortoj.

Sajnas do, ke nune, la devizo de la pacifistoj estas « Se vi volas pacon potencegi », kaj oni konsentos, ke ĝi multe similas al la konata romana formulo « Se vis pacem para bellum », kiu estas tiu de la *ne pacifistoj*. Al tiu devizo revenis Sr<sup>o</sup> Stead, la konata angla apostolo de l' paco, ĉar, farinte tra la mondo, antaŭ la Haga konferenco, veran krucmiliton por sukcesigi la anglan proponon por malarmo, li ĵus proponis en « *Review of Reviews* », ke Britujo respondu per konstruado de du kirassipoj, al konstruo, de Germanujo, de unu tiaspeca ŝipo.

Tamen kelkaj personoj, inter aliaj Baronino de Suttner bedaŭras, ke la porpaca Nobel'a premio, kvankam tiel prave aljuĝita al la eminenta Louis Renault, ne estas aljuĝita al Sr<sup>o</sup> Stead. La volumeto de Sr<sup>o</sup> H. Fried klarigas tiun paradokson.

*Dictionnaire Français-Esperanto et Esperanto-Français*, tre oportuna libreto enhavanta grandan nombron da francaj vortoj kun la traduko en Esperanto. Tiu volumo estos *tre utila* al la francaj samideanoj: 5 fr. bindita; 4 fr. 50 broŝurita ĉe *Esperantista Presa Societo*.

*Fabtoj de la Fontaine*: 12 artistaj poŝtkartoj instruantaj Esperanto'n per la Fablo: la kolekto 1 fr., afr. 1 fr. 10. Ankaŭ ĉe P. E. S.

En Esperanta universala biblioteko: *Guleton da Lakto*, la kortuŝa rakonto, kiu aperis en niaj kolumnoj. Ĝi estas la plej atentinda el la verketoj jam presitaj en tiu biblioteko (30 hel. ĉe la *Verda Standardo*).

*Konversacia Kalendaro*, de Karlo Steier; 1 m. ĉe Hans Th. Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzerstr. 44.

*Esperantista Poŝtkalendaro*, de Jos. Schröder; 1 m. ĉe « Germana Esperantisto ».

*Esperanto*, Gramatiko kaj Ekzercaro en greka lingvo (1 fr. 50 ĉe *Germana Esperantisto*).

**Hela Esperanto** (La *Tulo* esperantista por Svedoj) ĵus aperis, nova akiro por la bonega kolekto fondita de nia agema amiko Ĉefeĉ. Ni ĝin rekomendas ne sole al la Svedoj, sed ankaŭ al ĉiuj kiel propagandilon.

*Verba amuzaĵo*. Dua eldono, 1 sd. ĉe Pubul y Morales, Avellanias 7, Valencia, (Hispanujo).

*Les préjugés contre l'Esperanto*, bona respondo de De Mènil al pamfleto: la Sottise espèrantiste (1 fr. ĉe Bernard Grasset, 49 rue Gay-Lussac, Paris).

Baldaŭ aperos en Varsovio pole-Esperantan gazeton\* « Pola Esperantisto », kiu anstataŭos la samnoman Leopolan organon. La nova revuo estos redaktata de komitato el 7 personoj: redaktoro, Leon Zamenhof; membroj, Bein, Belmont, Bozostowski, Grabowski, Schels, Zakrzewski. Tiu nomaro sufiĉas por montri, kian konfidon meritas, de nun, la nova organo.

(1) Sr<sup>o</sup> Alfred H. Fried direktas la pacifistan revnon « *Die Friedens-Warte* ». Li eldonis specialan organon dum la Haga Konferenco, kaj ĵus aperigis novan verkon « *Die zweite Haager Konferenz, ihre Arbeiten, Ergebnisse und Bedeutung* »: MK, 3 (1,50 sm.); ĉe B. Elischer's Nachfolger Verlagsbuchhandlung in Leipzig, Talstrasse. Li estas fervora amiko de Esperanto.

**LA GRAFOLOGIO.**

— AL NIAJ LEGANTOJ —

Kelkaj personoj legintaj nian lastan artikolon pri la Grafologio skribis al ni por peti, ke ni imitu multajn naciajn gazetojn, malfermante grafologian rubrikon.

Oni scias, ke, per la skribado, la grafologiistoj divenas la tutan karakteron de la skribinto. Tio povas tre utili por elkoni sin aŭ siajn geamikojn; sed la grafologiistoj ne estas tre oftaj.

Ni demandis al nia samideano Sr<sup>o</sup> Henri Laisney, la verkisto de nia lasta grafologia artikolo, ĉu li bonvolus fari por la legantoj de « Tra la Mondo » iliajn « portretojn grafologiajn », t. e. verki ilian karakteron.

Sr<sup>o</sup> Laisney akceptis tion kun multe da plezuro.

Li komencos do la « portretojn grafologiajn » en la sekvonta numero de « Tra la Mondo ».

La legantoj, kiuj volos koni tiamaniere sian karakteron, devos sendi kelkajn liniojn el sia ordinara skribado al

Sr<sup>o</sup> HENRI LAISNEY,  
190, Rue Saint-Jean,  
Caen (Calvados) *Franujo*,

aldonante la sumeton je unu spesmilo (2 fr. 50). Oni bonvolu sendi kiel eble plej frue sian skribaĵon, por havi respondon en la sekvonta numero.

« TRA LA MONDO ».

**KORESPONDETO.**

**Mi estas 3 1/2 jara**, kaj mi sendos mian fotografajon al la fremdaj geesperantistoj, kiuj skribos al mi per ilustr. poŝtk. Max Bousquet, liceo de Roanne (Loire) France.

La **grupo de Armentières** (France) organizas grandan regionan ekspozicion por la monato de Julio 1908. Sin turni por seiĝoj al la prez. D<sup>o</sup> Briquet, rue Nationale.

« **Internacia Socia Revuo** », Bedaŭre mi ne povas akcepti vian proponon.

**V. Ŝulgin** (*Rusujo*). Dankon pro via tre interesa plumpentr-aĵo pri moroj studentaj. Sed iom da pacienco !

Sr<sup>o</sup> **Hulanička** (*Polujo*). Via respondo alvenis post la presado. Mi anstataŭis la vorton ne komprenitan per alia.

Sr<sup>o</sup> **Delas, Studenov**. Ni ne akceptas respondecon pro la aliaj revuoj, kaj transsendas nur la abonon. Turnu vin senpere al ili.

Sr<sup>o</sup> **J. D. Beretzky** interŝanĝas ilustr. poŝtk. kaj markojn. Budapest V, Aulich U. 5.

« **L'Etoile Espérantiste** » leviĝis sur nia ĉielo. Ĝi precipe zorgos por la propagando francalingva, celante interesi « tiujn, kiuj ankoraŭ ne estas Esperantistoj, kaj kiuj en la plimulto de niaj nunaj gazetoj trovas nenian allogan aŭ instruan por si » (Jarabono: France, 1 fr. 25; aliaj landoj, 0,80 sm.). Nia kunfrato sukcesu kaj varbu multajn adeptojn; kore ĉi tion ni deziras.

**NIA KONKURSO PRI HISTORIO SEN PAROLOJ.**

Ni estis iom embarasataj por elekti inter la sufiĉe multaj kaj spritaj solvoj senditaj. Ni konservis 4 sendaĵojn, inter kiuj 3 versaĵoj ĉar la amuzantaj bildoj inspiris precipe la poetojn, kaj 1 prozaĵon amuzscienespican, al kiu ni donis la duan rangon, kun la versaĵo de nia malproksima amiko R. Frenkel.

**Premioj.** 1<sup>a</sup> Malnovulo: 11 frankoj da esperantaj verkoj, inter kiuj *Vivo de Jesuo*, de E. Gasse; *Tra la Esperanta literaturo* de Giambene, 3 monatoj de *Germana Esperantisto*, kaj diversaj novaj verkoj. (Ricevebla kontraŭ 90<sup>c</sup> por la poŝtaj elspezoj).

2<sup>a</sup> Sr<sup>o</sup> E. Bacquet: 1 jaro de *Esperantisten*; 3 monataj de *Germana Esperantisto*; *Unua legolibro*, de Kabe; *konkordanco de Esperanto* de Wackrill (Ricev. kontraŭ 70 cent.).

Sr<sup>o</sup> R. Frenkel: 1 jaro de *Esperantisten*; duonjaro de *Japana Esperantisto*; *Inter Blinduloj*, de D<sup>o</sup> E. Javal. (Kontraŭ 75 c.).

3<sup>a</sup> — Sr<sup>o</sup> H. F. Schmidt: 1 jaro de *Esperantisten*, diversaj novaj verketoj. (Kontraŭ 40 c.).

Aldoni 10 aŭ 25 c. por la rekomendo. *Oni sendu poŝtmarkojn aŭ internaciajn respondkuponojn.*

Cito pri Sr<sup>o</sup> P. Renaud (Fr.) kaj Walter H. Meigh (Angl.), kiuj ricevos ĉiu la ĉarman rakonton *Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj*, de la akademiano Fr. Coppée, tradukita de nia redaktoro Sr<sup>o</sup> A. Montrosier.

Bone desegnanta anonimo sendis ironiplenan klarigeton, duonesperante duonfrance-ekster konkurso pro tio, kiu multe amuzis nin. Ni petas pri la nomo.

*Entute 35 fr. da premioj.*

Ni enpresos la sendaĵojn en nian proksiman Non.

« T. L. M. »

**BONEGA PROPAGANDO !**

Ĉiu esperantisto estas petata insisti ke la librovendistoj de la urbo ĉiam tenu provizon da niaj propagandiloj kaj elmontru en siaj fenestroj niajn reklam-kartonojn. Ni sendas afranke, ĉien en la mondo, centojn da « Slosiloj » po 3.50 fr. kaj da « Tutoj » po 7.00 fr. Skribu al

**Internacia Propagandejo Esperantista,**

Merton Abbey, London, S. W.

**« TRA LA MONDO » ĈE LA ĈIUSPECAJ KLUBOJ.**

Pli kaj pli « Tra la Mondo » penetras ĉe la neesperantistajn klubojn (militaj, sportaj, komercaj, k. a.), kaj ĉe la societojn diverssciencajn, ĉe la urbajn, lernejaĵojn..... bibliotekojn. Ni tre admonas niajn legantojn, ke ili agu tiucelen. Laŭ konsento de ĉiuj, « Tra la Mondo » estas unu el la plej efikaj propagandiloj uzablaj. Oni do utiligu ĝin, kiu, ja, estis kreata por la propagando (Vidu nian unuan Numeron).

**ĈE MAROKO.**

La 1<sup>a</sup>n de Januaro, la francaj militaj fortoj prenis la Kasba'n (fortikaĵon) de Medjuna post rapidira batalo, dum kiu la franca infanterio supreniris krutajn deklivojn malgraŭ densa pafado de l' marokanoj.

En tiu militago, la maroka artilerio ludis ian rolon, sed ĝi estis rapide silentigita de la potenca rapidpafa artilerio franca.

**LA BONEGA POŜHORLOĜO « L'ESPERO »**

daŭras kontentigi tiujn, kiuj ĝin aĉetas por si, aŭ por donaci. Tion pruvas, inter aliaj, la jena eliraĵo el menda letero :

« La 21/11 07 mi mendis, kaj la 3/12 mi ricevis « L'Espero ». Plej sincerajn dankojn ! Tiu poŝhorloĝo tiel bona estas, laŭ miaj provoj, ke mi deziras per via helpo, ricevi ankoraŭ unu ekzempleron... »  
21/12 07, A. Nordwall.

Ĉiuj aĉetintaj nian esperantistan poŝhorloĝon opinias same, tial ni ne ŝanceliĝas rekomendi tiun utilan akompananton, ankaŭ la plej bona portebla propagandilo.



MAROKA ARTILERIO.

Por Sinjoroj: 30 fr. = 12 sm. — Por sinjorinoj: ora, 90 fr. = 36 sm.; arĝenta, 45 fr. = 18 sm.

# GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

## GELLÉ FRÈRES

Parfumistoj

PARIS

La firmo korespondas Esperante.



# FLOR' ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO  
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro  
Ĝi meritas de la konfidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE

L. GUYOU & J. FÈVRE



# CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparaĵoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deonas maljunigante,  
sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LĜO.

L. GUYOU & J. FÈVRE

TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO.

TROYES

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

# Viskio Esperanto

Registered trade mark

Marque déposée

N° 270,042.

N° 13,195

Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la aŝiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

## Buchanan, Scott & C°

GARTHLAND STREET,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

# Internacia Sciencia Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Sciencia Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCIA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,

Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmiloj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Sciencia Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjøbenhavn (Danujo).



D. PETER, Kreinto, VEVEY (SVISLANDO).

## LEGU :

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ. — DUONSURDA.

Vidu la 4<sup>an</sup> kovrilan pagon.

# Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

**GRAVA AVIZO.**

**NI** povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn. **NI** akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo. **NI** aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto. **NI** sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.

(Internacia esperantista librejo)

Skribu LEGBLE — Rememorigu ĈIAM pri via adreso.

## ESPERANTAJ ORGANOJ.

**Eho Esperantista.** — Praktika kaj komerca. Ĉe S<sup>o</sup> Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

**Espero Katolika.** — Tute Esperante. Unu N<sup>o</sup> afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

**Espero Pacifista.** — Monata organo de l' Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S<sup>ro</sup> Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

**La Revuo.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>no</sup> Zamenhof. — ĉe Hachette k. K<sup>o</sup>, 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

**Socia internacia Revuo.** — Pritraktas ĉion, ĉio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

**La Verda Standardo.** — Scienca kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S<sup>ro</sup> Marich Agoston, Budapest IX. Ullői-ut 59. IV, 8.

## Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

### « LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:

ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,

Berlin, S. Prinzenstr. 95.

## PROPAGANDAJ ORGANOJ.

**The American Esperanto Journal.** — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard Station, Boston, Mass. (U.S.A.).

**Antaŭen Esperantistoj.** — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

**La Belga Sonorilo.** — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1<sup>an</sup> de Septembro.

**The British Esperantist.** — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

**Brazila Revuo Esperantista.** — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉe la administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.

**Časopis Českých Esperantistu.** — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

**L'Espérantiste.** — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

**Esperantisten.** — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta N<sup>o</sup>: 35 cent. (14 Sd.).

**Japana Esperantisto.** — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — N<sup>o</sup> 1a, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

**La Lumo.** — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n<sup>o</sup> 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

**Pola Esperantisto.** — Pole kaj Esperante. — 2 fr. 50 (1 Sm.) Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

**Ruslanda Esperantisto.** — Ĉiumonata organo de la S-to «Espero»; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S-to «Espero.»

**Suno Hispana.** — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (España).

**Svisa Espero.** — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

## ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

**Les Annales politiques et littéraires.** — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

**De Lusthof.** — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.).

Sin turni al la presisto de Tra la Mondo, Bruĝo, Belgando.

**La plume Sténographique de France.** — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — Dro: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literaturo kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

### UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. . . . . 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1<sup>e</sup> mankas la Aprila N<sup>o</sup>. . . . . 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2<sup>e</sup> mankas la Aprila kaj Maja N<sup>o</sup>j. 2,40 Sm.

### DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. . . . . 3,20 Sm.

## UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de  
FRANÇOIS COPPÉE.

Ano de la Franca Akademio,

Tradukita en Esperanto de A. Montrosier.

75 c. — 30 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

## DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

## Rekomendataj firmoj.

**ESPERANTA RESTORACIO ANONCAGENTO.** 80, Rue Mazarine, PARIS 6<sup>e</sup>. Bona familia kuirado je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton.  
C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquées à LA PLUS SIMPLE des langues suivant LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

## Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.). Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50  
VERVIERS, Place Verte, 20.

## LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,  
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj  
kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo,  
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

## Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K<sup>o</sup>

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skribliteroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Preslitteroj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K<sup>o</sup> sendas, laŭ peto, presprovajojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.  
A. J. WITERYCK, Presisto, Bruĝo.



NI NE RESPONDAS PRO LA GAZETOJ MENDITAJ PER NI.